






V 19034 / 1961

SPIDOLA & CINIO

5
1961

人民中國報道



KINGHUA-UNIVERSITATO

*Unu el la Plej Famaj
Ĉinaj Universitatoj en Pekino*

Antaŭ 50 jaroj la usona imperiismo fondis Kinghua-universitaton per parto de sia rabita mono el Ĉinio por superregi Ĉinion tra kulturaj agadoj. Sed kontraŭ ĝia volo, la studentoj de la universitato ĉiufoje aktive partoprenis en la patriotaj kontraŭimperiismaj movadoj jam antaŭ la Liberiĝo, kaj nun ĝi fariĝis ne nur tute socialisma sed ankaŭ multe pli granda kaj pli bone ekipita politeknika universitato de Popola Ĉinio. En la pasintaj 12 jaroj ĝi jam liveris c. 10.000 diplomitojn al diversaj konstruejoj kaj produkciejoj tra la tuta lando, 2.5 oblojn tiom kiom dum la tuta 38-jara periodo antaŭ la Liberiĝo.


(Daŭrigo sur la antaŭlasta paĝo)

1. La universitato riĉas je belajoj.
2. La totala planko-spaco de la nove konstruitaj domoj post la Liberiĝo estas 1.4 oblojn pli multe ol tiu de la c. 40-jara periodo antaŭ la Liberiĝo. La foto montras parton de nova domo.
3. Sub la kuomintang-a regado, la universitato havis nur c. 200 gestudentojn, sed nun en ĝi studas pli ol 10,000 gejunuloj. E la foto prezentiĝas unu el la novaj lekciejoj.
4. Nove konstruita dormejo por gestudentoj.
5. Ĉie en la kvieto kaj pitoreska universitatejo lega aŭ pentras gestudentoj.



Altgrada Eduko en Nova Ĉinio

AKCEPTINTE ŝtatajn asigojn, irinte labori en fabrikojn aŭ ŝtatajn farmojn aŭ kamparajn komunumojn, universitataj studentoj kaj profesoroj kaj aliaj universitataj laborantoj kune kun ili en nova Ĉinio laboregas mense kaj korpe ĝuste kiel laboristoj farante la ĉefajn problemojn en produkto siaj esploraj subjektoj kaj organizante siajn studojn ĉirkaŭ ili. Tio ĉi estas grava parto de la eduka sistemo de nova Ĉinio, sumigita en la politiko de "Edukado kombinata kun produkta laboro en servo al proletaria politiko". Tio signifas ke edukado estas vojo por kulturi socialism-animajn kulturitajn labo-



Kvara-jara studento de Maŝin-fabrika Fakultato de la Inĝeniera Instituto de Suda Ĉinio studas muntadon de aŭtomata bormaŝino kun laboristoj de la Guangdong-a Traktora Fabriko.

Foto de Hinhua

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Gazeto

Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Redakcio: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Administracio: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 5 (70) 1961

- Altgrada Eduko en Nova Ĉinio
- Antikva Batalkampoj Transformita en Grandan Fruktogardenon
- Trapaso tra la Mjaŭ-regiono kun Prezidanto Maŭ
- Ĝeng Ĝengong Reprenis Tajvan
- La Pluvo de Ĉerizflora Tempo
- La Semajnfino en la Ŝanhaja Laborista Kultura Palaco
- Post Pluvo
- Horloĝoj
- Homo kaj Trezoro
- Travivaĵoj de Du Filmaktorinoj
- "Astero" — Fabela Filmo
- Ĉina Infana Teatro
- Ventumilo
- La Sepa Feino Venis al la Homa Mondo
- Virina Montgrimpa Sporto en Ĉinio
- Mi Vizitis Ĉinion
- Literaturo pri Fantomoj
- Bildo sur la dorsa kovrilo — **Freŝa Verdo de Ginko** (ginkgo biloba — Akvarelo de Gu Juan)

rantojn, kiuj konscie penadas por plialtigi la materian kaj kulturen bonstaton de la tuta popolo. Precipe en la altgrada edukado, unuigo de edukado, produkt-laboro kaj scienca esploro — la procedo de "tri-enunu" jam fariĝis politiko konstanta. Ne nur la produkta kaj konstrua laboro, sed unue kaj antaŭ ĉio, edukado kaj scienc-esploro jam profitis el tiu ĉi praktiko.

Por ekvidi kiel ĝi funkcias, ni prenu ekzemple 3a-jarajn studentojn de topografio de Nankina Universitato, kiuj partoprenas en la projektoj por enjungi Ging-riveron — parton de Jangze-rivero de Iĉang malsupre ĝis la loko kie Dongting-lago kuniĝas kun ĝi ĉe Ĉenglinggi.

Ging-rivero, en la suda ebenejo de Hubej-provinco, obstrukcas la alie bonfaran kaj utilan Jangze-riveron per tordiĝantaj "liberaj serpentumoj", kiel ili estas nomataj en geologio, kiuj plilongigas la navigacian vojon, kaj malhelpas la fluon dum inundsezono kaj kaŭzas oftajn ŝanĝiĝojn de la fluejo. Por trovi la radikojn de la problemoj kaj jungi la riveron unufoje por ĉiam estas necese eltrovi kiel tiuj ĉi "liberaj serpentumoj" formiĝis, kaj akiri koncernajn referencajn materialojn. Tial, en la aŭtuno de 1958, la topografia klaso kaj ĝiaj profesoroj de la Nankina Universitato entreprenis la laboron por la ŝtato, kaj iris kun memfido labori sur ambaŭ bordoj de la ĝenega rivero.


Efektivigante la amasan linion de la Komunista Partio, la klaso dividiĝis en du- aŭ tri-personajn grupojn kaj faris pli ol 1,000 vizitojn al la loka po-

polo kaj dig-konservantaj laborantoj por lerni ĉion, kion ili sciis pri la historiaj, teknikaj kaj pedologiaj detalajoj koncernantaj la ŝanĝiĝojn de la fluejo, tiel malproksime antaŭe kiel la plej maljunaj loĝantoj en la regiono povis memori. Poste, farinte 1,000 aerajn fotografadojn, foliuminte ĉ. 5,000 historiajn librojn kaj dokumentojn, kaj borinte centojn da profundaj truoj por elpreni rokajn kaj terajn specimenojn, la studentoj povis iom post iom formi ĝeneralan bildon de Ging-rivero en diversaj periodoj kaj kompletigi diagramojn de ĝiaj topografia kaj pedologia formadoj.

Tio estas unu aspekto. La 3a-jaraj studentoj estis pli bone instruitaj en iuj kursoj tra ilia praktika laboro kaj laborejaj lekcionoj kaj diskutoj ol se ili estus limigitaj en studoj en la klasĉambro. Arego da problemoj kaj sufiĉe riĉa fonto de materialo en la aktuala laboro postulas seriozan, respondecan kaj kreeman traktadon por efektiva solvo. La unuigo de teorio kun praktiko estis ĉiutaga neceseco kaj ĝi donis bonajn rezultatojn. Ni prenu por ekzemplo ilian studon pri la Muelŝtona Kurbiĝo kie, kontraŭe al la ekzistanta teorio pri la kavernigo kaj erozio de dentitaj bordoj, de kio ĝi estas tipa specimeno, tie kolektiĝis amasoj da ŝlimo- kaj sablo-restaĵo. Surloka esploro, lekcionoj, diskutoj kaj analizoj kondukas al plena ellaboriĝo de la originalaj tekstoj kun gravaj novaj aldonadoj de materialo kaj teorio. Oni eltrovis ke la dentita bordo en-kaverniĝas kaj eroziiĝas nur kiam la kurbeco de la riverkurbiĝo estas egala al tiu de la akvofluo. Kiam la unua fariĝas pligranda ol la dua sekve de la disvolvo de la riverkurbiĝo, la dinamika linio de la fluo ne povas atingi

La dua grandtipa planetario fabrikita de profesoroj kaj studentoj de la Pekina Industria Kolegio

Foto de Hinhua



Profesoroj kaj studentoj de la Pekina Agrikultura Universitato ekstermas maizajn vermojn per grajnigita insektoveneno ĉe Jongfeng-popolkomunumo.

Foto de Hinhua



la internan kavaĵon de la kurbiĝo kaj la fluo de returnanta akvo postlasas ŝlim-sablan restaĵon.

Kiam la tekstoj kaj kursoj estas pliriĉigitaj kaj disvolvigitaj, novaj kursoj kaj teorioj komenciĝas, akcelante rapidan antaŭeniron en la sciencoj koncernataj. Antaŭ ol la topografia klaso de Nankina Universitato entreprenis la taskon asignitan de la ŝtato, la urĝa bezono de kurso pri la scienco de riverlito estis jam sentita, sed akademie la universitato ankoraŭ ne prepariĝis por doni tian kurson. Post la komplika termezurado kaj esplora laboro farita pri Ging-rivero, la nova subjekto estis inkluzivita unuafoje en la studprogramo de ĉina universitato.

En aliaj universitatoj kaj institutoj de alta lernado estis multaj kazoj kie novaj verkoj enkorpiĝantaj la kremon de la ekzistantaj sciencaj teorioj kaj la plej lastaj teknologioj kaj adaptitaj al la kondiĉoj en Ĉinio, rezultigis el periodoj da studoj kaj esploroj kunligitaj kun produkta laboro. "Principoj de Aŭtomata Regulado", "Teknologio de ŝip-konstruado", "Konstru-inĝenierado" estas kelkaj el la unuaj lernolibroj de tia speco verkitaj de nediplomitaj studentoj kunlabore kun siaj instruistoj post sia "tri-en-unu"-studado. Tiuj ĉi novaj verkoj aŭ kreeme sumigas novajn akiraĵojn aŭ anstataŭas malnovmodajn tekstojn, kiuj ne taŭgas por la nova situacio. Ordinare, ili bezonas malplimulte da klasĉambraj horoj por instrui ol la malnovaj kursoj aŭ tekstoj.

Ĉu la nova sistemo produktas diplomitojn ĉiuflanke trejnitaĵajn en siaj specialaĵoj? Rezultatoj montras ke la plena mastrado de kelkaj specifaj subjektoj, plialtigite de ĝeneralaj, vastaj studoj plus intersanĝo de sperto kun aliaj studentoj tute kompetentaj pri aliaj temoj, pruviĝis efikega. Por konvinkiĝi pri tio, oni bezonas nur vidi la centojn da miloj da teknikistoj trejnitaĵaj de post la Liberiĝo, kiuj estas kompetente funkciigantaj ĉinajn industriajn, agroteknikaĵajn kaj diversajn aliajn produktajn unuojn kaj institutojn.

Binghin*:



Antikva Batalkampoj Transformita en Grandan Fruktoĝardenon

ELVAGONIĜINTE ĉe la stacidomo de Nankou sur la Pekin-Baŭtoŭ-a Fervojo kaj rigardante ĉirkaŭen, ni trovis nin ĉirkaŭprenataj de la seninterrompe ondiĝanta purpura montaro Janŝan.

Ekaŭdinte pri Janŝan, mi tuj ekmemoris la sekvantajn versojn en la antikva epopeo pri la heroino Hua Mulan:

*La Flavan Riveron ŝi en la mateno forlasis,
Kaj nokton ŝi jam ĉe la Nigra Rivero trapasis.
Ne aŭdis plu la gepatran vokadon la forvojaĝanta
filino,
Aŭdiĝis nur blekoj de la tatarĉevaloj sur Janŝan
en tuja proksimo.*

Mi ne scias ĉu ĉi tie estis la sama loko kie la tataraj ĉevaloj surtretis, kiel menciita en la epopeo,

sed estis agnoskita de multaj jaroj ke ĝi estis antikva batalkampoj. La distrikto ĝis Nankou ampleksas oriente ĝis la Dektri Maŭzoleoj de Ming-dinastio (1368-1644 p.K.), okcidente de la Granda Muro, sude ĝis Hajdian-distrikto de Pekino kaj norde inkluzive de Gjujong-pasejo, kaj situante meze en mont-haoso ĝi estas efektive sterila dezerto, kie "vasta sablejo senfinas kaj neniu homo estas renkontebla" kiel priskribita en antikva literaturo. De tiu loko, kie abundas vento, ŝtonoj kaj dornejoj, kaj malmultas kultureblaj grundoj, akvo kaj arboj, la lokaj loĝantoj neniam esperis multan rikolton. Iam ili entreprenis tie

** Fama verkistino de Ĉinio*



Sur la pasinta sablejo nun prospere kreskas grenplantajoj dank' al diligenta laboro de la farmejoj.

Foto de Hinhua

La persikarboj plantitaj antaŭ
3 jaroj jam fruktodonas.

Foto de Hinhua

“alternan plantadon”, t.e. disjeti iom da semoj sur la maldikan tavolon da tero inter la ovalaj ŝtonetoj kaj pri la rikolto ili dependis de la plaĉo de la naturo.

Sed la vortoj “antikva batalkampoj” alportas al la loĝantoj senliman fierecon. Niaj prapatroj iam kontraŭstaris sur tiu ĉi terpeco la malamikojn kiuj transpasis la montpasejon kaj invadis nian landon. Kvankam ili ne povas diri precize kiam tio okazis, ĉu en Kin-dinastio (221-207 a.K.), Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.) aŭ en pli-posta tempo, tamen ili ligas kun tiu ĉi dezerta loko la nomojn de la generalinoj de la Jang-familio, kiuj faris obstinajn kontraŭbatalojn generacion post generacio kontraŭ fortaj malamikoj, kaj kiujn ili rigardas en sia koro la plej grandaj heroinoj. En la valo apud la fervojaj reloj de Nankou sin trovas Oficir-revua Roko de Mu Gujĵing, unu el la generalinoj de Jang-familio, kaj sur la monto estas “Teraso de fil-formeto”, kien laŭ onidiro Mu Gujĵing formetis sian filon Jang Venguang, tuj post kiam ŝi naskis la bebon kaj haste surĉevaliĝis por iri denove al batalo. Unuvorte, koncerne al la batalado kontraŭ malamikoj, la popolo estas ĉiam kuraĝa, absolute kun nenia depri-mita, peza sentimento kia montrita en la antikva literaturo *Kondolenco al la Antikva Batalkampoj*: “lamentas vento kaj subiris la suno, ĉio fariĝas malluma kaj trista.”

En februaro, 1958, trupo da naturreforma armeo alvenis al tiu ĉi sterila dezerto kun areo de pli ol 1300 hektaroj. Flirtis la ruĝa flago de granda antaŭensalto en la norda vento terbalaanta kaj stariĝis sur la sablejo malgranda mat-budo de la komandejo.

Tiu ĉi trupo el dumil tricent personoj por konstrui la Nankou-farmejon konsistis el la registaraj oficistoj kaj komercaj laborantoj el Pekino. Sub la gvido kaj inspiro de la Ĉina Komunista Partio, ili profunde konis la grandan signifon ke laboro kreas la mondon. Se ili nur dediĉas sian koron ardan al socialismo kaj movas sian paron da laboremaj manoj, ili certe povos plenumi tiun ĉi malfacilegan taskon transformi la naturon kaj remuldi sian ideologion. Sekve ili fervore eklaboris sur la sterila dezerto kie ĉiam debloviĝas sableroj kaj ruliĝas ŝtonetoj.

La loĝantoj de la dezerta loko alkuris kaj jetis al ili miroplenajn rigardojn. Ili vidis, ke tiuj ĉi kadroj laboras kun ĉieltuŝa energio kaj bolanta



entuziasmo, ili aŭ plugas sur la sablejo, aŭ plantas arbidojn en fosajojn, kaj kiam la ventego faligis ilin, ili tuj leviĝas ridante kaj relaboras malgraŭ ke la vizaĝoj estas plenkovritaj de sableroj. Sed la kialon ne povis diveni la lokaj loĝantoj. Ili diris ke, loĝante ĉi tie generacion post generacio dum centoj da jaroj, ĉu ili povas ne scii ke sur tiu ĉi dezertejo, kie fekas neniuj leporoj, ne kreskas eĉ bonaj herboj, — ne parolu jam pri fruktoj kaj legomoj. Sed kiam la armeo ŝvitis kaj laboris, ĉiuj ĝiaj anoj havis en sia koro plej novan kaj plej belan bildon: Ĉi tie, sub unuanima laborado malfacila, honesta kaj lerta, kaj post unu, du, kvin aŭ sep jaroj, fariĝos verda kamparo kun ombrantaj fruktoarbaroj kaj sennombraj dombirdoj kaj dombestoj. Ĉi tie ne nur estos bazo por provizi la ĉefurbon per fruktoj, floroj, ovaĵo kaj viando, kaj fariĝos ankaŭ granda parko, granda pitoreska belvida loko de la ĉefurbo. Ĉi tie, ne nur estos novtipaj ĝardenigitaj vilaĝoj, sed ankaŭ kinejoj, gimnastikejoj, naĝbasenoj, bibliotekoj, hospitaloj, bazaroj, bankoj, poŝtoŝefoj, librejoj, infanejoj kaj lernejoj de diversaj gradoj. Apud la akvokonservejo troviĝos ankoraŭ ripozejo por la maljunaj emeritintoj. . . . Ĉio ĉi tio certe ne estas nuraj revoj. La gvidantaj kadroj diras al si en la koro: “La japanajn diablojn ni forpelis. La naturan baron Jangze-riveron armite gardatan ni transpasis. Sub la gvido de la longe hardita kaj ĉiam triumfanta Ĉina Komunista Partio, ni estas neniam timigitaj de ĉiu ajn malfacilo. Ni nur sekvu la konsilojn de la Partio, neniu miraklon ni ne povas krei!”

Mirakloj elkreskis ĉie kvazaŭ printempaj burĝonoj. Nun sub la farmo kiu sin okupas ĉefe pri fruktoĝardenoj troviĝas ses branĉaj farmoj. Krome estas la Farmo de Teraso de Fil-formeto kaj Administracio de Hiangtan-akvokonservejo. La farmoj kune flegas dekdu mil fruktarbojn de pomo, vinbero, persiko, piro, abrikotoj kaj prunoj. La fruktoĝardenoj ampleksas ducent hektarojn. Inter la dombirdoj kaj dombestoj estas kokoj, porkoj, kunikloj, abeloj kaj diversaj ŝarĝbrutoj. Krom tio estas ankoraŭ legomoj, grenoj, fruktarbidoj, aliaj arbidoj, protektaj forstoj, k.t.p. La detalojn oni ne povas finlistigi. Tial lasu min priskribi unu angulon de la granda fruktoĝardeno transformita el la antikva batalkampo, kiun mi vidis tiun tagon.

Antaŭ kiam mi vizitis la Nankoŭ-farmejon, mi eĉ ne sciis ĝiajn ĝeneralajn konturojn. Je la tago de mia vizito, mi jam ne povis subpremi mian ekscititecon eĉ en la vagonaro. Plurfoje mi jam vizitis la konstruojn en diversaj lokoj de la lando. Ĉiun fojon mi sciis, ke post paso de kelkaj turniĝoj sur la zigzaga montvojo, prezentiĝos antaŭ mi bildo kiun mi neniam forgesos dum mia tuta vivo. La atendo al tia ekscitiĝo ĉiam faras al mi senliman emocion kaj ĝojon.

Elirinte el la Nankoŭ-stacidomo, ni direktis nin suden, pelate de la norda vento de nia dorsflanko, trans larĝan ŝoseon, kiu kuras de oriento al okcidento. Poste ni turnis nin al ŝoseo kiu kuras de nordo al sudo. Ĉi tie estis jam la tereno de la farmejo. Ni vidis ke sur la kampoj apud la ŝoseo multaj homoj estas fosantaj akvofluejojn. Fine ni alvenis al la ĝenerala administrejo de la farmejo. De malproksime ni vidis ke tie troviĝas solenejo kaj kelkdek bonorde vicigitaj domoj frontantaj al la sudo. Sur la tegmento alte elstaras la anteno de televid-aparato.

Sur la placo estas metitaj kelkaj agrikulturaj maŝinoj. La oficejo estas alta betona domo, kies amplekso ne estas malpli granda ol tiu de ordinara oficejoj en Pekino. Vicfarmejestro Vang kaj partisekretario Ĝang akceptis nin en la meza salono. Laŭ ilia mieno mi povis legi ke, tiuj ĉi du kamaradoj estas ankaŭ plenaj je modesteco, sincereco kaj energio kiel ĉiuj gvidantaj kadroj kiujn mi renkontis antaŭe sur aliaj konstruejoj. La varmeco kun kiu ili akceptis vizitantojn estis precipe kortuŝa. Kvazaŭ junaj gepatroj fiere montrantaj sian nove-naskitan belan bebon, ili elportis du pladojn da dikaj arakidaj legumenoj produktitaj de la farmejo mem kaj kratag-pudingoj faritaj de ĝia nutraj-fabrika. La abunda tagmanĝo kiun ili speciale preparis por ni estis aparte aroma kaj bongusta. Sed ili diris kun bedaŭro: "En vintro nenio estas vidinda aŭ bongusta. Bonvolu venadi ĉi tien en printempo kiam floras la fruktarboj kaj en aŭtuno kiam maturiĝos la fruktoj kaj grenoj."

Sidante sur sofoj apud forte hejtita forno, ni senŝeligis kaj manĝis la arakidfruktojn, dum vicfarmejestro Vang kaj partisekretario Ĝang interplene rakontis al ni, kvazaŭ babilante kun intimaj amikoj, kiel la antikva batalkampo estas transformita en grandan fruktoĝardenon: Kiel ili fosis ŝpato post ŝpato kaj kiel ili semis korbon post korbo; kiel ili plantis fruktarbojn, kreskigis ventsirmajn forstojn, fosis akvokonservejojn kaj akvofluejojn, bredis dombirdojn kaj dombestojn, starigis fabrikojn, konstruis domojn. . . unuvorte, kiel multe, rapide, bone kaj ŝpare konstruis kaj produktis, samtempe, ĝis la hodiaŭa skalo, kaj atestis grandan antaŭensalton kiu disrompis ĉiujn antaŭajn rutinojn. . . .

Levante la kapon kaj montrante al tiu ĉi vasta salono kie pendas premiflagoj, vicfarmejestro Vang diris al ni ridetante: "Tiu ĉi domoj estas tute konstruitaj de ni kadroj mem, komence de la fundament-kreo ĝis la starigo de la muroj, fiksado de la tegoloj kaj instalado de pordoj, fenestroj kaj elektraj lampoj. Tio estis nia plej granda rikolto politika. Prezidanto Maŭ alvokis kadrojn malsupreniri unue por plialtigi la politikan konscion kaj ami laboron, due por hardi la korpon kaj trie por lerni esti multkapablaj. En la komenco multaj el ni povis porti ŝarĝon nek surŝultre nek permane. Multaj eĉ malestimis fizikan laboron en la pasinteco. Alveninte ĉi



En la laktobovinejo de Nankoŭ-farmejo.

Foto de Hinhua

Vespere, farmejanoj laŭplacé
sin amuzis per kantado.

Foto de Hinhua



tien, ili unue trasperte ekkomprenis la grandecon kaj gloron de la laboro. Ili komencis proksimiĝi al la kamparanoj kaj sentis sian malgrandecon. Post praktika malfacila hardado, ili ellernis plugadon, fari semadon, peli ĉevalon, veturigi veturilon, bredi kokojn, manĝigi porkojn, konstrui domon, profundan puton kaj akvokonservejon, eĉ pritondi harojn, ripari ŝuon kaj fliki veston. Tiamaniere ili komencis havi la pensojn kaj sentojn de la laboranta popolo. Kunligiĝis strikte iliaj pensoj kaj esperoj kun la konstruado de la farmejo kaj la konstruado de socialismo. Kiam ili enloĝiĝis en la domojn kiujn ili mem konstruis, manĝis la legomojn kiujn ili mem kreskigis, ellernis produktajn sciojn, sin hardis en fortajn korpojn. . . . iliaj ĝojoj kaj fiero estis apenaŭ priskribeblaj. Ili varme ekamis la fizikan laboron, la kolektivan vivon. Kiam venis ilia vico reveni al la ĉefurbo, multaj ne povis reteni siajn larmojn de disiĝo. Ili reportis la bolantan entuziasmon kaj energifreŝecon al siaj oficejoj kaj laboris kun senlima fervoro. Iu kadro el banko ellernis ĉarpentistan arton. Post kiam li reiris, li kreis dum la kampanjo de teknika renovigo lignan keston por rapida kalkulo de bankbiletoj.

La sukcesa starigo de la farmejo havis grandan influon sur la popolon. Vidante ke la fruktarboj sur la sablejo vivas, legomoj kaj grenoj alportis rikolton, akvo elfluas el la profundaj putoj kaj la sabla deklivo fariĝis 'magia vazo de trezoroj', ili estis tiel ĝojaj ke ili admiris la Komunistan Partion el sia koro. Ili ekkonis ke la gvido de la Partio estas korekta kaj ke homoj multaj havas forton grandan. 'Alkondukiĝas akvo kaj ekvivas la tero.' Ili ankaŭ komencis kulturi, manĝi kaj vendi legomojn."

Parolante pri la perspektivoj de la farmejo kaj la nova vilaĝo, el la okuloj de la du gvidantoj ekbrilis plezuro plena je memfido. Unu el la etaĝdomoj de la nova vilaĝo estas jam finkonstruita. Tagon post tago kreskas la fruktarboj, reproduktiĝas la dombirdoj kaj dombestoj kaj plimultiĝas la agrikulturaj maŝinoj. . . . Kelkajn jarojn poste, fariĝos ĉi tie nova socialisma vilaĝo. Mi sidas ĝuste kontraŭ ili. La varmaj sunradioj prilumas la blankajn murojn kaj la beldesegnajn brikojn de la planko. Ĝi ankaŭ prilumas mian vizaĝon. En aŭskultado de la sonora kaj firma voĉo plena je decidemo kaj memfido, subite aperis antaŭ miaj okuloj la vizio de tiu socialisma nova vilaĝo kun altaj domoj kaj larĝaj stratoj borderitaj de arboj en longaj vicoj kie regas vigla trafiko. La pejzaĝo estas pitoreska. Aromas la floroj kaj kantas la birdoj. . . . Kaj tiu ĉi prospera

bela urbeto stariĝis el la antikva batalkampoj. Kion la antikvuloj ne povis imagi, estas fine efektivebla hodiaŭ, se nur oni kuraĝas pensi kaj agi. En la mallonga deko da jaroj, mi jam vidis la efektivecon de la aspiroj de la popolo en multaj lokoj tra la vasta teritorio de la patrio. Ni havas plenan fidon al la nin gvidanta Komunista Partio kaj la sagaca kuraĝa popolo.

La ses branĉaj farmejoj disiĝas tre malproksime unu de la aliaj kaj estis ne eble viziti ĉiujn el ili. Ni vizitis nur la fruktejon, pork-bredejojn kaj ferment-fabrikon de la unua branĉa farmejo kaj kelkajn kok-bredejojn kaj kuniklo-bredejojn de la tria. En la kok-bredejoj sin trovas diversspecaj kokoj: *leghorn-aj* kokoj, nigraj kokoj el Aŭstralio kaj ĉinaj framitfloraj kokoj. En la kuniklo-bredejoj sin trovas angoraj, arĝentharaj k.a. kunikloj. La labor-spirito de la laborantoj kaj la blindiga brilo de miloj da ruĝaj krestoj rebrilantaj sub la subiranta suno alportis al mi tre profundan impreson. Sed kiam mi admiradis dum la rondiro mi ne notis iajn ciferojn de la disvolviĝo de kreskigo de fruktarboj, aŭ bredado de dombirdoj aŭ dombestoj. Estas senutile noti ciferojn okaze aŭditajn. En la tempo de antaŭensaltigo, ĉio ŝanĝiĝas ĉiumonate, aŭ eĉ ĉiutage. Kiam oni revenos alian fojon, la ciferoj denove altiĝos kiel sagpintoj supren direktintaj. Tiajn spertojn mi jam havis plurfoje, sekve mi tute ne bedaŭris ke ĉi-foje mi ne memoras la ciferojn de disvolviĝo. Nur kiam mi sidis en la ĉaro sur la revena vojo al la stacidomo kaj profunde enspiris la refreŝigan mont-venton, mi sentis ke mia varma koro ŝajne estas multe pligrandigita denove. Ĉar en mia koro jam troviĝas la grandiozaj projektoj de la Sanmen-montgorĝo, Dangiangoŭ k. a., kaj de hodiaŭ mi devas pligrandigi la spacon por kare enlokigi la grandan fruktoĝardenon transformitan el antikva batalkampoj.

Trapaso tra la Mjaŭ-regiono kun Prezidanto Maŭ

— Rememoro pri la Longa Marŝo de la Ruĝa Armeo —

EN novembro, 1934, la Ruĝa Armeo trapenetrus la grandan Hiang-riveron en Hunan-provinco — la kvaran blokadlinion de la malamikoj depost la komenco de la Longa Marŝo — kaj alvenis al granda ŝoseo ĉe la limo de Guanghi- kaj Hunan-provincoj. Kaŭze de la furioza atakĝenado fare de la malamikaj aeroplanoj dum la tago, Prezidanto Maŭ kaj ni plejparte marŝis dum la nokto. Kiam ni alvenis al la ŝoseo, ni povis nenion klare vidi, ni sciis nur ke ni iradas laŭ la ŝoseo; ĉe matena elkrepuskiĝo ni trovis nin en treege malgranda montvilaĝo.

Pro daŭra marŝado kaj batalado, la Prezidanto jam longe ne bone manĝis. Tuj kiam la trupoj ekhaltis, mi kaj mia samsubplotonano juna Zeng iris serĉi manĝaĵon. Ĉar la montvilaĝo estis malgranda kaj la vilaĝanoj malriĉaj, ni sukcesis aĉeti nur iom pli ol 10 kilogramojn da batattuberoj trairinte la tutan vilaĝon. Kiam ni bone kuiris ilin en la granda kaj tre profunda terpotego uzata speciale en Guanghi-provinco kaj alportis ilin en la ĉambbron kiun okupis la Prezidanto, ni trovis ke li, sidante sur ligna benketo, estas pri io parolanta al la gvardianoj kaj bredistoj ĉirkaŭ si. Mi nur kaptis la frazon: “La trapenetra trans Hiang-riveron estas granda venko.” Efektive! La transpaso trans Hiang-riveron en la nokto estis vere malfacila.

Portante la potegon, Juna Zeng kaj mi kriis: “Jen venas la manĝaĵo! Jen venas la manĝaĵo!” Alveninte antaŭ lin, mi diris: “Prezidanto, nenio estas trovebla ĉi tie krom batattuberoj.”

Nenion dirante, la Prezidanto ekprenis unu, kaj demordinte unu pecon, li diris: “La batattubero estas sufiĉe bona, tre dolĉa.”

“Kvazaŭ sakarino estus aldonita.” Ĉe ekaŭdo de la parolo mi sciis ke tion diris Ding Lianghiang. Kie ajn li estis, ĉu dum marŝado ĉu en batalado, la parolo de Ding ĉiam fluis senĉese kvazaŭ el plene streĉita gramofono. Lia karaktero estis ĝuste kontraŭa al tiu de lia kolego Ĝong Jonghe, kiu estis ekstreme ŝparema en sia parolo sub ĉiu ajn kondiĉo.

Tiam ni komencis manĝi, iuj sidante kaj aliaj starante, kaj samtempe interbabiladi.

“Prezidanto,” diris denove Ding Lianghiang, “kial ni ne iris al Gujlin (ĉefurbo de Guanghi-provinco — la red.) hieraŭ nokte laŭ la ŝoseo?”

“Vi nur scias iri al granda urbo . . .” diris mi sed tuj ĉesis, ekrimarkinte ke la Prezidanto estas parolonta.

“Ni devas daŭre iri antaŭen,” diris la Prezidanto, “kaj iros en la regionon de mjaŭ-oj!”

“La regiono de mjaŭ-oj!” Kia nova afero! En la pasinteco ni aŭdis en la politika leciono, ke mjaŭ-oj estas unu el niaj naciaj malplimulto, iliaj kulturo



*La Ruĝa Armeo kaj
Nacimalplimultaj Po-
polanoj*

Olepentraĵo de Lin Ijoŭ

kaj ekonomio estas ankoraŭ estiĝintaj, kaj ili havas kutimojn kaj morojn ankaŭ tute apartajn, kaj ili estas persekutataj ankoraŭ pli peze de la blanka armeo. Sed kiaj ili efektive estas? Tio estis al mi, ĉiuokaze, io sufiĉe mistera. Estas ja tre interese povi iri tien ĉiĉoj kaj rigardi propraokule.

“Kiel ni han-oj,” tiam daŭrigis la Prezidanto, “ili ankaŭ faras revolucion kaj kontraŭstaras la subpremon de la blanka armeo. Tial ili estas ankaŭ niaj bonaj fratoj.”

Post tio la Prezidanto pli konkrete klarigis al ni kiel mjaŭ-nacio estas subpremata de la blanka armeo kaj kiaj estas iliaj kutimoj, moroj, religia kredo, k.t.p. La Prezidanto ordonis al ni ke alveninte al la mjaŭ-regiono ni devas pli bone observi la disciplinon en rilatoj kun la popolamaso: unue, ne estas permesate iri ĉien arbitre, kaj due, nek tuŝi objektojn de la popolanoj laŭplaĉe. Li diris cetere ke iliaj virinoj ne similas al tiuj en la soveta regiono, kie la virinoj kutimis krii: “Jen revenas fratoj de la Ruĝa Armeo”, kiam ili vidis la ruĝarmeanojn, dum la fratinoj en la mjaŭ-regiono ne ŝatas tiamaniere saluti.

Avertite de la Prezidanto, ni ĉiuj kiuj servis ĉe li sentis grandan malfacilecon. Ĉu ni ne venos en malpermesitan lokon? Kiel agu se ni volos pruntepreni objektojn, kiam ni alvenos al etapo? Mi do demandis: “Prezidanto, ĉu ni povos pruntepreni pordklapon?” Ĉar pasinte kiam ni alvenis ien kie ne troviĝis lito, ni prunteprenis kutime pordklapon kiel lito por la Prezidanto.

“Estas ne permesite pruntepreni pordklapon!” Dirinte tion, la Prezidanto demandis al mi ridante: “Ĉu ne estis dirite, ke estas malpermesite tuŝi objektojn de la popolanoj laŭplaĉe?”

“Sur kio vi do dormos?”

“Estos egale sur kio ajn, sed ne prunteprenu pordklapon!”

Mi ne parolis plu, kvazaŭ esti iel maljuste traktita. Mi pensis ke la karaktero de la mjaŭ-oj certe estas tute malsama ol tiu de la han-oj kaj ili certe estas eksterordinare severaj. Dum mia meditado eklaŭtiĝis ies ronkado. Mi ĵetis rigardon kaj trovis ke tiu estas la portisto k-do Huang Jinghe. Li

kuŝis dormanta ĝuste apud la Prezidanto, kun duona batattubero ankoraŭ en la mano.

La Prezidanto ekrigardis Huang kaj diris ridante: “Nu, post satmanĝo ĉiuj endormiĝu, ĉar en la nokto ni devos ankoraŭ marŝi!”

Ĉiuj kuŝiĝis. Kvankam ni bezonis dormon, sed krom Huang Jinghe neniu povis endormiĝi. Post la tagiĝo la aeroplanoj de la malamikoj denove ĉirkaŭflugadis sur la ĉielo kvazaŭ funebnonanca trumpetego, kaj senĉese faligis bombojn sur la domojn de la popolanoj kaj en la rizkampojn. Ni ĉiuj diris malame: Damnindaj banditoj, iam la popolo reguligos la konton kun vi!”

.....

Denove komenciĝis la nokta marŝo.

La noktoj en novembro estis malvarmaj. Kvankam la malvarmo estis ne akra, ĝi estis tamen senkompata al ni dumnoktaj marŝantoj. Sur la klara ĉielo ne pendis la luno, sed nur la trembrilantaj steloj akompanis nin en antaŭeniro. En la kvietaj noktoj aŭdiĝis de tempo al tempo interkomunikado inter la antaŭaj kaj malantaŭaj trupoj kaj subpremitaj krioj. Iam ankaŭ aŭdiĝis la henoj de ĉevaloj kaj la sonoj de vipoj de bredistoj. La trupoj ja marŝis en bona ordo, kun tre malmultaj postlasiĝintoj.

La tutnokta marŝo konsistis preskaŭ tute el rondirado ĉirkaŭ monttalioj, jen alten, jen malalten, aŭ supren grimpante aŭ malsupren glitante. Iafoje ni atingis montpinton tiel altan kvazaŭ niaj kapoj tuŝus la ĉielon. Ĉiufoje kiam ni alvenis al montsupro, la Prezidanto ĉiam ekhaltis kaj rigardis antaŭen kaj returnen, demandante al ni ĉu iuj postlasiĝis, por denove daŭrigi la antaŭeniradon.

Ĉe frua mateno ni malsupreniris de iu monto. Sur la deklivo de la kontraŭflanka ne tre granda monto aperis antaŭ ni kelkaj lignaj domoj. Tiuj domoj estis tre strangaj, kiajn ni neniam vidis antaŭe. Ili estis nek unuetaĝaj domoj nek duetaĝaj, sed kvazaŭ korboj pendantaj en la aero. Kaj la Prezidanto diris al ni ke tio estas loĝejo de la mjaŭ-oj.

Kiam ni eniris en la montvilaĝon, la suno jam leviĝis kaj la maldensa nebulo malaperis. Nun estis



Frukto-strato de Guang-nacio

Ĉinstila pentraĵo de Deng Erlong (Guang-nacio)



La Prezidanto sin returnis, demetis sian krajonon kaj demandis ridetante: "Vi ne tuŝis alies fiŝojn?"

Ilustris A Laŭ

klare videblaj la domoj unu apud alia, kies malantaŭajn murojn formis la kruta montdeklivo kaj kies ĉambroj elsoviĝis el la monto kvazaŭ ili elkreskus el ĝi. Malsupre de la domoj sin trovis bredejoj de porkoj kaj ŝafoj. Sub fenestroj estis murmurantaj montfluetoj. Iuj el ili eĉ kunfluis en lagetojn. Mi memoris, ke kiam ni kontraŭbatalis la bienulaĉojn en Gianghi-provinco, ni trovis en iu el iliaj domoj pentraĵojn kun iom simila vidaĵo al tiu ĉi vilaĝo, sed estis multe malpli bela ol la pejzaĝo antaŭ ni.

La domo en kiun enloĝiĝis la Prezidanto ŝajnis sufiĉe bona. Sub la fenestro troviĝis sufiĉe granda lageto, en kiu estis kulturataj multe da karpoj. Pro tiu ĉi eltrovo mi kaj Vu Giking (tiam gvardiano de la Prezidanto) estis precipe ĝojaj.

"Ni akiru kelkajn fiŝojn por la Prezidanto!" proponis Vu. La ideo mem estis ja brila, sed ekmemorante la vortojn kiujn la Prezidanto diris al ni hieraŭ, ni ne kuraĝis etendi niajn manojn.

"Eble tiu ĉi domo apartenas al bienulaĉo?" diris Vu por agiti ĉiujn al ago, kiam li rimarkis ke la aliaj restas mutaj al lia propono.

"Laŭ mia opinio estas pli bone demandi la Prezidanton unue!" La proponon kontraŭ-metis k-do Ĝong Jonghe malrapide.

Kunportante akvon mi iris en la ĉambron de la Prezidanto kiu estis ĝuste preta por ripozi. Mi metis la akvon sur bambua tablo kaj staris dum momento, cerbumante por iel komenci. "Prezidanto," mi finfine elpensis ian ĉirkaŭparolon. "Ĉu vi estas malsata?"

"Ĉu estas ia manĝaĵo?" demandis la Prezidanto.

"Jes!" rapide mi respondis.

Turninte sian vizaĝon por rigardi min, la Prezidanto demandis: "Kio estas la manĝaĵo?"

"Estas fiŝoj, tre grandaj fiŝoj!" diris mi, versante la akvon kaj samtempe ŝajnigante kvazaŭ mi dirus tion indiferente.

"De kie?" demandis la Prezidanto plu.

"Jen tie!" Mi montris al la lageto ekster la fenestro.

La Prezidanto alpaŝis al la fenestro, rigardis eksteren kaj sin returninte demandis al mi kun severa rigardo: "Ĉu vi tiel rapide forgesis kion mi diris al vi hieraŭ?"

Klinante la kapon mi demandis mallaŭte: "Ĉu ni ne povas aĉeti ilin per mono?"

"Ne, eĉ aĉete!"

"Eĉ kelkajn?" Mi decidis fari la lastan provon.

Travidinte kion mi pensas, la Prezidanto alpaŝis kaj sidiĝis antaŭ mi, pacience klarigante al mi la staton de la naciaj malplimulto kaj la politikon de nia Partio. Li diris: "Ne tuŝu iliajn bredaĵojn, ĉu grandaj ŝafoj aŭ grandaj fiŝoj! Eble ili rezervas la bredaĵojn por oferi al dioj."

Forvaporigis jam la espero akiri fiŝojn, mi ne kuraĝis menciigi plu la planon preni fiŝojn kiel "batali kontraŭ bienulaĉo" kaj malsupreniris kun la sitelo. Antaŭ ol mi eliris el la pordo, mi aŭdis la ordonon de la Prezidanto:

"Ĉen Ĉangfeng, diru al ĉiuj ke ili ne tuŝu la posedaĵojn de la popolanoj! Ni manĝos kion ajn ni havas!"

"Jes," mi respondis kaj iris suben. Tuj renkonte mi vidis Vu Giking, kiu versajne staris tie speciale por atendi de mi novaĵon. Rimarkinte min, li ektiris min al si kaj demandis mallaŭte: "Kiel?"

"La Prezidanto ne konsentis," mi diris malbonhumore.

"Se ni pagos?"

"Ankaŭ ne!" Poste mi laŭte diris en lian orelon: "Tio estas disciplino! Ĉu vi komprenas?" Post tio mi forkuris.

Kiam la suno kliniĝis okcidenten, alvenis subite dekkelkaj per fusiloj armitaj personoj en han-aj kostumoj, kiuj volis vidi la Prezidanton.

Mi ordigis la veston kaj alproksimiĝis al ili, demandante: "De kie vi venas?"

Aŭdinte mian demandon, ili montris afablon kaj unu el ili respondis al mi en malfacile komprenebla Guanghi-a dialekto: "Ni estas lokaj anoj!"

"Lokaj anoj?" mi pensis. "Do ili estas mjaŭ-oj. Pro kio ili volas viziti la Prezidanton? Kaj plie, kun fusiloj." Mi demandis al ili: "Ĉu vi havas necesan atestilon?"

"Jes!" Iu el ili kun alta staturo elpoŝigis tre malgrandan slipon kaj transdonis ĝin al mi.

Ĝeng Ĉenggong Reprenis Tajvan

ĜENG Ĉenggong estas unu el la naciaj herooj en ĉina historio. Ĝuste antaŭ tri jarcentoj, en la jaro 1661, li komandis grandan armeon transpasi la maron kaj forpelis la nederlandajn invadintojn, kiuj okupis nian teritorion Tajvan, kaj tiel distingiĝis per sia eminenta merito repreni la perditan teritorion por la patrio.

Tajvan Estas Teritorio de Ĉinio Jam de Antikveco

De antikveco Tajvan estas nia teritorio. La gaŭšana popolo, kiu vivas sur la teritorio, de antikveco estas ano de multnacia granda familio de nia lando, kune kun la hana popolo konkeris ĉiujn malfacilojn, diligente laboris kaj ekspluatis Tajvan. En la tempo de la Tri Regno (220-280 p.K.), Sun Kĵuan sendis generalojn Vej Ven kaj Ĝuge Ĝi trans la maron kun dek mil soldatoj al Tajvan (siatepe nomata Jiĝoŭ). En Sujdinastio (581-619 p. K.), en Tajvan iom post iom plimultiĝis hanoj enmigrintaj por terkulturado, kaj plioftiĝis ankaŭ la komercaj aktivadoj inter la insulo kaj la kontinento. Juan-dinastio (1279-1368 p.K.) establis Oficejon de Inspektoro en Tajvan. Tio estis la komenco de starigo de administra institucio de Ĉinio tie. En Ming-dinastio (1368-1644 p. K.), por defendi kontraŭ la invadoj de fremduloj, estis plue establitaj patrolaj trupoj en Tajvan, kaj poste, ankaŭ

sturmbrigado por tie resti garnizone. Ekde tiam Tajvan funkciis kiel fortikaĵo de mara defendo de la patrolando, kaj fariĝis la antaŭposteno de la ĉina popolo kontraŭ koloniistoj.

En la deksepa jarcento, tiu riĉa kaj bela trezorisulo de nia lando estis perforte okupita de nederlandaj koloniistoj. Tiam la nederlandanoj akiris la "surmaran hegemonion" kaj faris piratecajn rabadojn en la zono de la orienta kaj suda maroj de Azio. En 1601, la armita komerca ŝiparo de Nederlando la unuan fojon venis al Ĉinio, trovinte ke ni gardis nin forte en mara defendo, ĝi ne kuraĝis agi malprudente. En 1603, la nederlandaj koloniistoj okupis Penghu, sed post nelonge ili estis devige forpeltitaj de la Ĝenerala Komandanto de Garnizonoj de Fugian, Ŝen Joŭ-jong, kiu havis grandan armeon sub sia komando. En 1622, la nederlanda invadarmeo denove okupis Penghu, sed en 1624 ĝi estis forbatita de la trupoj de Ming-dinastio. Ĝiaj postrestintaj trupoj forkuris en la regionon de Anping kaj la ĉirkaŭaĵo sur la sudokcidenta marbordo de Tajvan, kaj en 1642 ili forpelis la hispanajn koloniistojn okupantajn Tajbej. De tiam la nederlandaj koloniistoj okupis Tajvan, la plej grandan insulon de Ĉinio, por preskaŭ tridek ok jaroj.

Tamen, ĉie la popolo han-nacia kaj gaŭŝan-nacia leviĝis kontraŭ la invado de fremdaj koloniistoj. En 1652 ili faris grandskalan armitan kontraŭstaron, kiu persistis dek kvar tagojn, sed malfeliĉe ĝi malsukcesis



Mi eniris en la ĉambron de la Prezidanto kun la slipo. La Prezidanto estis rigardanta grandan mapon. Mi aliris por raporti: "Prezidanto, iuj atendante ekstere volas vin vidi."

"Kiaj personoj ili estas?"

"Lokaj anoj!" Mi transdonis la slipon al la Prezidanto kaj diris aldone: "Cetere kun fusiloj."

Finleginte la slipon, la Prezidanto levis la kapon kaj diris al mi kun ĝoja eksciteco: "Rapide invitu ilin en la ĉambron!" Tion parolante li eliris por persone bonvenigi la gastojn.

Mi kondukis tiujn nekonatojn en la ĉambron de la Prezidanto kaj retiriĝis eksteren. Sed estis granda mistero al mi: Kiaj personoj ili efektive estas? Kial la Prezidanto estas tiel varma al ili?

La nekonatoj restis longe en la ĉambro de la Prezidanto. Ili foriris nur kiam la suno subiris.

Post ilia foriro mi enportis vespermanĝon por la Prezidanto kaj trovis ke li estas ankoraŭ staranta antaŭ la mapo, sur kiu estis desegnitaj jam multaj ruĝaj cirkloj. Metante la manĝaĵojn mi diris mal-laŭte: "Vespermanĝu, Prezidanto!" La Prezidanto sin returnis, demetis sian krajonon kaj demandis ride-

tante: "Vi ne tuŝis alies fiŝojn?"

Ridante mi skuis la kapon kaj demandis al la Prezidanto: "Kiu estas tiuj personoj?"

"Ili estas mĵaŭ-aj kamaradoj!" respondis la Prezidanto kun granda ĝojo.

"Ĉu mĵaŭ-oj ankaŭ havas fusilojn?" mi demandis scivoleme.

La Prezidanto ĵetis al mi rigardon kaj diris: "Ili estas gerilanoj de mĵaŭ-nacio kaj niaj kamaradoj."

"Ĉu ankaŭ troviĝas niaj kamaradoj inter mĵaŭ-oj?" mi demandis miroplene.


"Ĉie troviĝas niaj kamaradoj! Ĉie troviĝas komunistoj!" La Prezidanto bonhumore aldonis: "Ĉu nur vi rajtas revolucii?"

Mi ridis naive.

Tiun nokton, ni denove formarŝis de tiu ĉi loko. Sur la vojo mi subdiris al Vu Giking: "Ha, vi devas scii ke inter mĵaŭ-oj troviĝas ankaŭ komunistoj, ankaŭ gerilanoj kaj ankaŭ niaj kamaradoj!"

"Efektive?"

"Kial ne!" mi diris. "Tiuj kiuj venis tiun ĉi posttagmezon estas iliaj reprezentantoj!"



Ĝeng Ĉenggong Reprenis Tajvan

Huang Gjun, Lo Ming kaj Lu Hongnian

fine. En la jaro 1661, la popolaj armitaj fortoj de la sud-orienta marbordo de Ĉinio, ĉirkaŭ Ĝeng Ĉenggong kiel la centro finfine forpelis la nederlandajn piratojn kaj reprenis Tajvan.

La Nacia Heroo Ĝeng Ĉenggong

Ĝeng Ĉenggong estas unu el la naciaj herooj en nia historio. Origine li estis nomata Ĝeng Ŝen, naskiĝis en 1624, la jaro en kiu la nederlandaj koloniistoj invadis Tajvan. En sia juneco, li estis saĝa kaj brava. Lia patro Ĝeng Ĝilong estis enoficigita kiel Vickomandanto de Arme-korpuso en la lastaj jaroj de Ming-dinastio. En 1645 kiam la manĉuaj trupoj envenis tra Ŝanhajguan-pasejo, princo Ĉu Jugian de Ming-dinastio kroniĝis kiel imperiestro en Fuĝoŭ, kaj Ĝeng Ĝilong estis titolita kiel la grafo de Gian'an. Kiam Ĝeng Ĝilong ricevis aŭdiencon ĉe la princo kun sia filo, la princo demandis al la filo, kiel oni povos savi la patrolandon? La junulo respondis: "Jue Fej (1103-1141 p.K.) iam diris: 'Se monon ne avidas la civilaj oficistoj kaj morton ne timas la armeaj oficiroj, sekuriĝos jam la tuta lando.' Miaopinie, tiuj

ĉi vortoj havas gravan signifon precipe en la nuna tempo." La respondon ege aprobis la princo, kaj li honoris lin per dono de la nomo de la imperiestra familio—Ĝu, kaj enoficigis lin kiel komandanton de la gvardio. La patro Ĝeng antaŭe administris Tajvan dum multaj jaroj. Guo Huajji kiu gvidis la tajvanan popolon kontraŭstari nederlandajn koloniistojn, estis lia iama subulo. Pro tio, la batalado de la tajvana popolo kontraŭ nederlandaj koloniistoj gvidata de Guo Huajji vekis grandan prizorgon ĉe Ĝeng Ĉenggong. Kiam Guo Huajji komencis la ribelon, nederlanda misiisto en Tajvan raportis al Orienta Azia Kompanio, Java, ke Ĝeng Ĉenggong ĉiam priatentas la aferojn en Tajvan. En 1646, Ĝeng Ĝilong kapitulacis al King-dinastio, la dudekdujara Ĝeng Ĉenggong ĉagrenite de la pereado de lando kaj familio, kaj la sufero de la popolo, alte levis la standardon por batali kontraŭ King-dinastio. Tamen, en sia batalado en la regiono de sud-orienta marbordo li ofte malsukcesis, kio instigis lin al planado por forpeli nederlandanojn kaj repreni Tajvan. En 1660, He Tingbin el Tajvan

(Daŭrigo sur p. 239)

La Pluvo de Ĉerizflora Tempo

ĈIE en Hakone troviĝas varmaj fontoj. Kaj krome, tie la pejzaĝo delikate belas. Kiu ne iris tien sinbani en varm-fonto, tiu ne povas esti kalkulata kiel vizitinta Japanion. En marto, printempe, mi sukcesis elŝteli kelkan liberan tempon por ekskursi tien du tagojn. Admirinte unu post alia tiajn fame-konatajn lokojn kia la lago Aŝinoko kaj la inversa ombro de la blankpinta monto Fujijama en ĝi respegulita, fine mi malsupreniris per kablovagono al la fundo de iu valo nomata Ŝimado kaj ekloĝis en iu hotelo. La hotelo estis gustoplene konstruita kun zigzaga verando kaj ĉirkaŭira galerio, kaj la ĉambroj estis ornamataj per kelkaj antikvaj kuriozaĵoj — ĉio en pure japana stilo. Mi ŝanĝvestis min per malstrikta kimono kun vastaj manikoj kaj havis varmfontan banadon por forigi la polvon de sur mia tuta korpo. Kaj la vespermanĝon jam alportis en pleto iu knabino nomata Kimiko.

Kimiko estis en ĉielblua kimono, kvieta kaj honestaspekta. Genuante sur la mato, ŝi priservis nin per aldono de teo aŭ rizo, kaj speciale konsilis al mi gustumi kelkajn pecojn da kruda fiŝaĵo el la jadkolora porcelana bovleto, dirante ke la tinuso estis ankoraŭ viva antaŭ nelonge. Mi trempis du pecojn da kruda fiŝaĵo en saŭcon kaj manĝis ilin, kiuj efektive odoris kaj gustis tre bone.

Subite Kimiko ekĝemis mallaŭte kaj diris: “Vi ĉiuj estas seriozaj, bonvirtaj homoj.”

Mi ne bone komprenis kion ŝi aludis. Kaj klariĝis Kimiko en milda tono: “Vi ne similas al tiuj, kiuj alveninte tuj drinkas kaj petolaĉas.”

“Ĉu vi scias de kie ni venis?” mi demandis

“Jes,” ŝi respondis ridetante, “tial vi estas tiel bonaj ke vi neniun traktas maldece.”

“Ĉu estas iuj kiuj ankoraŭ vin traktas maldece?” mi demandis denove.

Malleviste la rigardon Kimiko diris: “Ni servistinoj estas malestimataj de ĉiuj kaj ĉiu ajn povas laŭplaĉe nin insulti. Precipe la usonaj soldatoj estas terure timigaj.”

“Ĉu multaj estas la usonaj soldatoj?”

“Verŝajne ne malmultaj, ĉar eĉ ĉe Fujijama troviĝas pafkampo de la usona armeo. Mia hejmo estas en Jokosuga, kie estas mararmea bazo de Usono delonge. Vi ne povas imagi al vi kiel tiranas la usonaj soldatoj, kiuj estas pli ferocaj ol lupoj.”

“Kion malbonan tiuj lupoj efektive faris?”

Tiu ĉi demando hezitis Kimikon. Ŝi klinis la orelojn por aŭskulti ĉu estas iu ekster la papera por-do, hezitis ekparoli kaj fine respondis elturniĝe: “Mi ne scias klare kion fian ili faris efektive. Kiam oni

ekvidas usonajn soldatojn, la animo tuj forfuĝas de la korpo pro timo kaj oni devas haste sin kaŝi. Kiu do scias kion ili faras!”

Kaj mi pretervole demandis al ŝi ŝin rigardante: “Kiu estas ankoraŭ en via familio?”

Subite ŝanĝiĝis la mieno de Kimiko, tre malgaje kaj solece ŝi ekaspektis, kaj nur post longa tempo ŝi diris kvazaŭ al si mem: “Jam mortis, jam mortis ĉiuj. Postrestas nur mi sola. . .” Post tio ŝi eksilentis, gapante eksteren tra la fenestro.

Ekster la fenestro estis krepusko. De la pinarbaro sur la kontraŭa montodeklivo leviĝis vasta tavolo da griza nebulo. Ekfuriozis ventego, kiu sin puŝis de la montosupro ĝis la fundo de la valo, senbride sin jetis ĉien skue klakigante la pordojn kaj fenestrojn.

Ekridis perforte Kimiko, kaj intence ŝanĝis la paroltemon: “Ekblovas vento, do sekvos pluvo. La pejzaĝo ĉi tie estas propre tre bela: Printempe ĉarmas ĉerizfloroj sur la kontraŭa monto, aŭtune la tuta monto plenkoviĝas de ruĝaj folioj, tiel bele kiel en pentraĵo. Ĉi printempe falis neĝo kaj la ĉerizarboj frostigite ankoraŭ ne floras nun. Verŝajne ne bone floras la ĉerizarboj pro la ŝtormo.”

“Kiel longe pompas la ĉerizfloroj?” mi demandis.

“Nur kelkajn tagojn,” respondis Kimiko. “Kelkiam kiam ili estis en prospera florado, tuj velkiĝis post ununokta vento kaj pluvo.” Sur ŝia vizaĝo denove montriĝis ombro de melankolio.

Oni diras en Ĉinio ke la japanoj ofte komparas la vivon kun la ĉerizfloroj en lamento pri la mallongeco de la vivo. La malgajeco de Kimiko devenis eble de tio ke ŝi bedaŭris sian forvelkintan junecon aŭ ke ŝi ne povis forgesi siajn dolorajn travivaĵojn? Kian korsiran vivhistorion efektive havis tiu ĉi bona japana knabino, ŝi ne kuraĝis malkovri pro timo. Malgraŭ tio oni tamen povas ĝin eldiveni. Ŝia suferado ne povas esti alia ol tio kion la japanoj ĝenerale suferas nuntempe; kaj ŝia doloro estas ankaŭ nepre la komuna doloro nuntempa de la japana popolo.

Mi alvenis al Japanio ankoraŭ ne longe, sekve mi ne multe aŭdis aŭ vidis, sed en tiu ĉi multkolora diboĉe luksa kaj ĥaosa vivo, kelkaj aferoj min tuŝis precipe profunde. Iu intima japana amiko foje al mi demandis kian impreson mi havas pri Japanio. Mi diris ke en Japanio sin trovas kvar “abundoj”: abundo de trafikaj akcidentoj, abundo de reklamoj, abundo de asekuraj kompanioj kaj abundo de lombardejoj. Ĉiufoje, kiam ajn mi vidis la grandan nombron de viktimoj ĉiutage indikitan sur la anonctabuloj de trafikaj akcidentoj sur movoplenaj ĉefstratoj, mi

estas vere ŝokita. Ĉiufoje kiam mi vidis balon-reklamojn en la aero aŭ groteskajn neonreklamojn en la nokto, kiel ekzemple, la grandan strigon sidantan sur la tegmento de domo en Ginza, Tokio, kiu turnadis kaj turnadis la du okulojn kaj detempe-altempe petoleme fermis unu el ili dum la turniĝado, mi sentis min kvazaŭ falinta en marĉon, ĉie regas ĥaoso. Kaj kiam mi vidis reklamojn de tiaj asekuraj kompanioj kiaj kontraŭ fajrakcidento aŭ morto, precipe en profundaj noktoj kiam mi vidis de malproksime elpendaĵojn lumigatajn kun la ruĝa ideografiaĵo “質” (lombardejo) en flankaj stratetoj, mi sentis kvazaŭ infera, malvarma vento rekte blovus kontraŭ mia vizaĝo kaj mi povis imagi al mi kiel mizera estas la vivsorto de la japana popolo malantaŭ tiu nenormala prospereco.

Sed, kiam mi montris la kvar “abundojn”, la japana amiko diris: “Ni devas aldoni ankoraŭ unu plian abundon, nome, la abundon de bazoj de la usona armeo — tio ĉi estas la ĉefa kaŭzo de ĉiuj malfeliĉoj de la japana popolo.” Aldone li sciigis al mi ke laŭ la aserto de kuracistoj, en la malsaneca japana socio sin trovas du plej timindaj malsanoj: Unu estas la kancero kiun suferas multaj junulinoj pro tro malbona nutrado kaj mizera vivado, post kiam ili estis seksatencitaj de usonaj soldatoj, graviĝis kaj sin abortigis. La alia estas la spirita epilepsio suferata de multaj personoj, pro tio ke tiuj sub la peza subpremo de la vivo estas longe en konstanta spirita streĉiteco pro la timo de senlaboreco kaj malsato, kaj, krome, longe trolaciĝas de laborado. Ili povas fari ĉian ajn teruraĵon kiam la malsano atakas ilin.

En tia socio plena je difektoj kaj malsanoj la sorto de la japana popolo estas facile imagebla. Kial do necesas pli profunde pridemandi la personan malfeliĉan vivhistorion de Kimiko?

La suferoj de Kimiko devas havi sian epokan karakteron, sed ĉe ŝi mi bedaŭrinde ne povis trovi la maltiman epokan spiriton de la japana popolo. Tiu ĉi spirito manifestiĝis en la uragana batalado kontraŭ la “Japan-Usona Sekureca Traktato” kaj ankaŭ en la nuna printempa batalo. Kimiko estas tiel timema kaj mola ke ŝi ne vidas sian morgaŭon, nek la estontecon de Japanio.

Kuŝante en la varmfonta hotelo Ŝimado tiun nokton, mi ne povis facile endormiĝi daŭre turniĝante en la lito, multe pripensante, de Kimiko ĝis Japanio. La japanoj nomas la varmfonton Infero, ĉu eble mi vere kuŝis apud infero?

Finfine mi endormiĝis kaj kiam mi vekigis, jam longe tagiĝis. Ĉe miaj oreloj sonis susurado de ekstere. Ridetante Kimiko tirmalfermis la paperumitan kradpordon, kviete enpaŝis en la ĉambron kaj puŝmalfermis la protektan tabulon de la fenestro. Ekster la fenestro falis printempa pluvo. Mi jetis rigardon al la kontraŭa monto kaj vidis blankaĵon ĉe la montopiedo. Mirigite mi demandis: “Ĉu neĝas aŭ pluvas?”

“Pluvas,” milde respondis Kimiko kun rideto. “Rigardu al la kontraŭa monto: la ĉerizfloroj distendis siajn petalojn pro la tutnokta ventblovado kaj pluvado.”

Do la blankaĵo ĉe la monto estis efektive duonflorantaj ĉerizfloroj.

Post matenmanĝo ni ordigis niajn pakajojn por elvaliĝi per kablovagono. Subite estingiĝis la elektraj lampoj. Interrompiĝis la elektroprovizado. La kablovagono haltis survoje en la aero, ne povante moviĝi. La turistoj en la vagono kriis en konfuzo.

Kimiko nereteneble murmuris al si: “Eble pro striko?” Mi rimarkis ke el ŝiaj okuloj elsaltas du fajreroj. Mi ne atendis ke en tiu ĉi timema animo ankaŭ kaŝiĝas la fajra deziro de la japana popolo. Do mi ŝin mistaksis lastnokte.

Mi ne estis tiel urĝema por elvaliĝi, sekve mi rekte ekstaris antaŭ la fenestro, rigardante al la ĵus ekflorintaj ĉerizfloroj. Vento kaj pluvo povas detrui ĉerizflorojn, sed jen, ĉu la ĉerizfloroj ne povas ankaŭ rideti spitante la venton kaj pluvon? Kiel bele kaj pompe floras la neĝblankaj ĉerizfloroj morgaŭ post la ĉeso de la vento kaj pluvo! Se ĉerizfloroj povas simboli la japanan popolon, tiuj ĉerizfloroj florantaj en vento kaj pluvo estas vere la simbolo de la japana popolo.

Prezidanto Maŭ Nin Gvidas en la Paradizon

Verkis Palĝorĉoegjal (liberigita tibeta
servutulo)

Prezidanto Maŭ, Prezidanto Maŭ,
en l' estinto mi ja aŭdis, ke la paradizo belas,
sed montriĝis, ke ĝi nur fabelas;
ke bonkoras bodhisatvoj, aŭdis mi antaŭe,
sed malsanis, mortis paĉjo, panj' malgraŭe.
Prezidanto Maŭ, Prezidanto Maŭ,
la Tibet-popolon Vi prezidas,
jam en veran paradizon Vi nin gvidas.

La Unua Rikolto

Ĉen Mou





La Semajnfino en la Ŝanhaja

Laborista Kultura Palaco

LA vespero de sabato estas tempo eksterordinare brumovema en la Ŝanhaja Laborista Kultura Palaco.


Tuj en la pordego de la Palaco estas teatro, en kiu laboristoj-aktoroj el diversaj fabrikoj estas prezentantaj siajn belegajn programerojn de muziko, danco, ĉjujio,* dramo k.t.p. Tiuj ĉi programeroj plejparte estas verkoj de laboristoj mem. La amatora trupo de folkloro muziko de Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko, kun pli ol sesdek membroj, ludas muzikaj komponitan de ĝi mem *Abunda Rikolto de Bonkvalitaj Ilmaŝinoj*, sub la direktado de la sindikat-prezidanto de la fabriko. La amatora danca trupo de Jaŭhua Vitro-fabriko prezentas dancon verkitan de ĝi mem *Fraŭlino Fibro*. La parol-kanto de Ging'an Ŝpin-Teksa Fabriko *Decido de la Manĝeja Personaro* estas novaĵo — kvin kuiristoj, kun kuiriloj, mang-bastonetoj, bovloj kaj teleroj en la manoj kaj kantas kaj frapas akompane. La gajiga kaj humura gestado vekas aplaŭdegon en la tuta aŭditorio.

Samtempe, en la Kultura Halo sur la unua etaĝo okazas kantkoncerto, kies programon konsistigas ne nur ĥoroj, sed ankaŭ antifonoj, soloj kaj gestkantoj. Ludas en ĝi ne nur kanto-trupoj de gejunuloj sed ankaŭ de maljunaj laboristoj.

En ĉambro apud la Kultura Halo estas te-kunveno, kiun ĉeestas la reprezentantoj de progresemaĵ produktantoj kaj agrikulturon subtenantaj laboristoj el diversaj fabrikoj. Tie ili interŝanĝas siajn spertojn aŭ farojn en subtenado al agrikulturo. Liu Huj-tong, la grupa estro de Ŝanhaja Kaldronego-fabriko parolas pri iliaj progresemaĵ agadoj en subteno al agrikulturo. La kuiristoj de la 10-a Ŝtata Koton-Teksa Fabriko, Daŝeng Ĉemiz-fabriko, k.a. prezentas siajn spertojn en mastrumado de manĝejo.

En la "Literatur-arta Te-trinkejo" la atmosfero estas pli gaja kaj vigla. Laboristoj trinkas teon kaj samtempe ĝuas literatur-artajn amuzojn kiel

** Speco de ĉina popola literaturo inkluzivanta diversformajn kantrakontojn, humor-dialogon k.s.*



Laborista amatora orkestro de nacia muziko prezentas en la palaco.

Foto de Hinhua

pingtan,** humura dialogo, gest-kanto k.t.p. Kelkaj laboristoj suriras la podion kaj mem kantas pecojn de pekina opero.

En la biblioteko sur la tria etaĝo, laboristoj de Joŭlong Maŝin-fabriko kaj aliaj okazigas "Konkurson de Librokritikado". La legintoj parolas pri siaj akiraĵoj en legado de bonaj verkoj kaj diskutas pri elstaraj literaturaj. Laboristo Ĉen Giaŝu resume prezentas al la aliaj la enhavon de la nova verko pri rememoraĵo de la revolucio—*En la Koro Estas Miliono da Heroaj Soldatoj*, kaj ricevas bonan akcepton.

La aŭditorio sur la sama etaĝo fariĝas ekspoziciejo de pentraĵoj kaj poemoj verkitaj de laboristoj mem. La laboristaj verkistoj el la Unua Fer-Ŝtala Fabriko de Ŝanhajo, la 3a Ŝtata Tinktura Fabriko, k.a. ĝoje kunvenas, por poem-verki kaj pentri. La laboristaj verkistoj Gu Hiangli, Tan Zajhi, Li Mejki kaj Ŝen Gian deklamas poemojn verkitajn de ili mem. Ili konkuras unu kun alia per siaj poemoj en tute entuziasma atmosfero.

La tuta kvara etaĝo de la Palaco estas ejo destinita por antaŭ-ripetoj de amatoraj art-trupoj. En la halo kaj la suda kaj norda galerioj ĉie pendas fotografajoj de ludoj de la laboristaj amatoraj arttrupoj. En la antaŭripet-ĉambroj ĉe ambaŭ flankoj de la galerio, aktoroj de laboristaj amatoraj arttrupoj estas aŭ sinalivestantaj por provludi, aŭ antaŭripetantaj novajn ludojn. En la antaŭripeta ĉambro de Pingtan-trupo, teksistino Vu Hiufang kune kun siaj gekamaradoj estas antaŭripetanta ilian novan verkajon *Superi la Mardajn Ondojn*. Vu Hiu-

fang ne nur ripetfoje gajnis la honoran titolon de "Progresema Produktanto" en la lastaj jaroj kaj fariĝi modela laboristino land-fama, sed ankaŭ en la literaturamuza aktivado montras sian artistan talenton. Nun ŝi povas partopreni en prezentado de pingtan, Ŝanhaj-opero, Ŝaŭhing-opero, Huaj-opero kaj aliaj ludoj.

Tre riĉa kaj varia estas la aktivado de la sabata vespero en la Ŝanhaja Laborista Kultura Palaco. Krom la supre menciitaj estas ankaŭ koncerto el gramofonaj diskoj, ĉina ŝakludo, maĉo de tabloteniso, sportoj k.t.p. Multaj respondeculoj de fabrikoj kaj de rilataj instancoj ankaŭ plezure partoprenas la vesperan kunvenon kune kun la laboristoj.

** *Speco de ĉjuji-o, rakontado kun multa kantado akompanata de kelkaj muzikiloj.*



Tuj finota pentraĵo de Dong Lianbaŭ, laboristo de Hajtong-a Alumini-fabriko de Ŝanhajo.

La fama ŝpinistina labor-modelo Huang Baŭmej (la unua dekstre en la unua vico) kantas Ŝaŭhing-operon en la palaco por laboristinoj.

Fotoj de Hinhua

POST PLUVO

POST unu-nokta printempa pluvo, la persikarboj ekfloris pompe. En la persikarbaro ĉirkaŭanta la traktorstacion, subite leviĝis tondraj muĝoj: la traktoroj, unu post alia, ruliĝis de la stacio al la kampoj.

Ne longe post la traktoroj foriris por urĝa plugado, kun gaja humoro venis en la oficejon de la traktorstacio junulo kun densaj brovoj kaj grandaj okuloj, portante pakajon sur la dorso.

“O, Fangping!” La staciestro Ŝu tuj lin rekonis. Li estis la nov-edzo de Lingfeng, la bonega traktora kondukistino de la stacio kaj juna sed malnova labor-modelo de la aŭtoriparejo de la distrikto.

“Vi portas eĉ pakajon kiam vi vizitas vian edzinon. Kien vi iros?” demandis la staciestro.

“Al ‘la fronta linio.’”

“Al nia komunumo?”

“Ne, al Ĝajtang!”

“O! ne proksime, vi devos transgrimpi la montojn,” diris la staciestro, afable helpante lin demeti la pakajon.

Ĉar morgaŭ estos la tago por anonco de alveno de Fangping, li tial speciale iris tre frue hodiaŭ por viziti Lingfeng-on ĉi tie. Sed kie estas ŝi? Ĉu ŝi estas deĵoranta? “Ne!” pensis Fangping, “ŝi klare skribis en la letero ke ŝi havos libertagon hodiaŭ!”

Bone sciante kion Fangping nun pripensas, la staciestro diris: “Vi venas ĝustatempe, kaj ankaŭ ne ĝustatempe. Hodiaŭ, estas libertago por Lingfeng. Sed, frue en la mateno, ni ricevis telefoninformon ke

la maizkampoj de la produkta brigado de Dugia-vilaĝo bezonas pli fruan plugadon. Sciiginte pri tio, la virino kiu neniam volas ripozi, tuj forveturigis la traktoron.”

Aŭdinte tion, Fangping tute ne estis malplaĉita. Anstataŭe, li sentis nepriskribeblan ĝojon leviĝanta en sia koro.

“Sed ne ĉagreniĝu!” daŭrigis ŝerce la staciestro. “Ŝi revenos baldaŭ! Nia stacio ne povas ŝin perdi!”

Ĝuste tiam, la telefono eksonoris. La staciestro prenis la aŭskultilon, el kiu sonis urĝema kaj zorgplena voĉo: “Ĉu estas K-do staciestro? Ĉi tie estas la Liuĉuang-a Produkta Brigado. Niaj maizkampoj ankaŭ bezonas esti pli frue plugitaj. Bonvolu nin helpi, por fini la plugadon hodiaŭ. . . .”

“Ĉiuj traktoroj estas okupitaj. Nun restas en la stacio nur unu ‘ankranta’, kiu bezonas riparadon. Kaj ankoraŭ alia estas ekstere. . . .” la staciestro pensis pri la “Drako N-ro 1” funkciigata de Lingfeng, kaj jetinte ekrigardon al Fangping, ĉesigis abrupte sian parolon. Eĉ se Fangping ne venus hodiaŭ, ĉu estas konvene ree sendi Lingfeng-on, kiu jam laboris pli ol duontagon en sia libertago? La staciestro embarasiĝis: “Bone, bone, atendu iomete, kaj mi tion aranĝos.”

La staciestro remetis la aŭskultilon, dirante al si mem: “Post la printempa pluvo, ĉiuj deziras pli fruan plugadon, tie kaj ĉi tie. . . . Pli frue, jes, estas bone eĉ unu minuton pli frue. . . .”


Aŭdinte ĉion, Fangping komprenis la tutan aferon, kaj ankaŭ komencis cerbumi en si mem.

Ĝuste en tiu momento, muĝis traktoro ekster la fenestro: Lingfeng revenis!

Ili rapidis eksteren ŝin renkonti. Lingfeng desaltis lerte de la maŝino, kaj kiam ŝi vidis Fangping-on,

Al la Kamparo

Ĉinstila pentraĵo de Ĝaŭ Min



ŝia polvumita vizaĝo tuj ruĝiĝis, ne povante eldiri eĉ unu vorton.

Lingfeng kondukis Fangping-on al sia loĝejo. Post interŝanĝo de kelkaj vortoj, Fangping diris rekte: "Mi foriros fruĉ morgaŭ."

"Jam morgaŭ? . . ." Lingfeng demandis, irante kun la pelvo por alporti akvon. Sed Fangping haltigis kaj informis ŝin pri la urĝa telefona peto de Liuĉuang-a Produkta Brigado pri traktoro.

"Ŝajnas al mi ke la staciestro intencas mem veturigi," Fangping diris, kun mallaŭtigita voĉo. Lingfeng ekridis: "Kiel li povas foriri de ĉi tie? La stacio ne povas resti vaka!" Ŝi puŝmalfermis la pordon kaj rigardis eksteren. Efektive, la staciestro ja estis senbrue sin okupanta pri enverŝado de oleo kaj akvo al la "Drako N-ro 1".

Ferminte la pordon, Lingfeng sin returnis, kaj per ŝiaj grandaj brilantaj okuloj rigardis fikse al Fang-

ping Fangping ekridis kompreneme, kaj sentis refoje neskribeblan ĝojon en sia koro. Li balancis la kapon kaj diris: "Vi povas iri! Sed vi devas unue forkonduki la staciestron for de la traktoro, kaj poste rapide formalaperi kun ĝi."

Lingfeng aŭskultis lin kun rideto, denove prenis kun si la akvobotelon kaj manĝajsaketon kaj post pripenso ŝi diris: "O, jes, sed estas alia afero kiun vi devos fari!"


Fangping palpebrumis inteligente: "Mi scias kion mi devos fari!"

Koincide, ĝuste en tiu tempo la telefono en la oficejo denove sonoris, kaj la staciestro iris al ĝi.


"Estas mi mem! Ne zorgu! Mi tuj sendos traktoron al vi. Ne malfruiĝos via semado. . . ." Dum la interparolado, subite li aŭdis zumadon de motoro. Li rapide forlasis la telefonon, kaj elkuris por vidi. Lingfeng jam veturigis la traktoron tra la pordo de la korto. Li postkuris kelkajn paŝojn, sed estis haltigita de Fangping. La staciestro piedbatis en malespero. Post momento, ili ne plu povis vidi Lingfeng-on. La "Drako N-ro 1" levis nubon da polvo post si, kaj la kvinsoka plugilo brilis per arĝenta brilo.

Iom post iom mallumiĝis la ĉielo, kaj Lingfeng ankoraŭ ne revenis. La staciestro eliris rigardi maltrankvile, kaj venis al la loĝdomo por vidi Fangping. Kiam li venis al la proksimo de la garaĝo kies pordo estis neriglite fermita, li subite stultiĝis, ĉar en la garaĝo, malforta lumo de elektra torĉo vidigis fortan kaj solidan figuron, kliniĝantan super la traktormotoro kun la kovrilo levita, riparantan la motoron. Ne povante regi sian troan emocion, la staciestro entrudis sin tra la pordo kaj firme ĉirkaŭbrakis la largajn ŝultrojn, kriante: "Fangping!"

Fangping levis sian kapon, kaj ridis.



*La Junecon Ili Dediĉas al la Agrikulturo
Ĉinstila pentraĵo de Ŝilian*



KOREKTO

Sur p. 182 de la lasta numero de nia gazeto aperis *Homo Ekflugis al Kosmo*, poemeto verkita de nia bulgara kamarado Ilio Andre'enk'o. Sed tre bedaŭrinde pro fuŝa aranĝo de la presajo anstataŭ nomon de la aŭtoro oni metis tute senrilatajn literojn super la titolo. Pro tio ni petas

pardonojn de la aŭtoro kaj la legantoj. Troviĝis ankaŭ aliaj gravaj eraroj: Sur p. 170 la komenca vorton de la 3-a linio sub la ilustraĵo oni devas legi "100-an" anstataŭ "90-an", kaj sur p. 204 la du fotoj estas erare lokitaj unu anstataŭ la alia.

La Red



Horloĝoj

I U rakontis al mi sinsekve tri historiojn pri horloĝoj, kiuj fakte ne povas esti kalkulataj kiel historioj. Li diris:

En mia junaĝo mi sciis nur horloĝojn, sed ne poŝ-horloĝojn. Kiom da personoj en vilaĝeto aŭ urbeto povis posedi poŝhorloĝojn? Horloĝon ni ja havis en nia hejmo. Ĝi ĉiam unue susuris dum longa tempo antaŭ ol ĝi timeme eligis pezajn obtuzajn sonojn: tang . . . tang . . . tang . . . Ĝi ne donis al mi ian koncepton pri la tempo. Mi nur malklare sentis ke miaj pliaĝuloj kaj najbaroj efektive iom similis tiun dekadencan, malfortan, malnovan horloĝon.

Ŝajnis ke la pliaĝuloj ankaŭ ne postulis ke la horloĝo donu al ili koncepton pri la tempo. Rigardi al la suno jam sufiĉis en serenaj tagoj. Se pluvis, vespero fariĝis kiam mallumiĝis. Ni ne havis kalendaron en la hejmo, ĉar, ĉiel ajn, hodiaŭo estas simila al hieraŭo kaj morgaŭo estos sama kiel hodiaŭo. Dum tiuj stagnaj jaroj ankaŭ nia horloĝo ekhaltis. Sed neniu rimarkis de kiu tago ĝi ĉesis funkcii, tiel aŭ aliel, la horloĝo haltis por ĉiam.

En la hejmon kelkfoje venis vizitanto. Post ĝemoj kaj suspiroj, li ekbabilis kun mia patro pri sensignifaj temoj:

“Ĉu via horloĝo haltis?”

“Jes, ĝi jam ĉesis funkcii de tri jaroj — eble de kvin jaroj.”

“La urbeto aspektas kiel antaŭe. Restas ankoraŭ tiuj samaj domoj.”

“Restas ankoraŭ tiuj samaj domoj. — Sed la domoj sur la strato ĉiam pli kliniĝis okcidenten, jaron post jaro; se okazos faliĝo, neniu domo sur la strato restos sekura.”

. . . . Poste mi iris al Ŝanhajo, la edeno de fremdlandaj aventuristoj, por fariĝi metilernanto kaj komencis perlabori. (Anstataŭ menciigi la suferojn kaj malfacilaĵojn kiujn mi traspertis, mi parolu ankoraŭ pri horloĝoj.) Mi loĝis en ĉambreto por kuirejo. La flankan ĉambreon teretaĝan okupis et-oficisto en iu fremdula kompanio. La vicluiganto, kiu vivtenis sin en borso, okupis la unuan kaj duan etaĝojn kaj krome la salonon en teretaĝo. Mi ne havis horloĝon. La et-oficisto havis vekhorloĝon, tiel kadukan kiel li mem, kiu aŭ malrapidiĝis aŭ ne sonoris. Kun la vekhorloĝo en sia tremanta mano, li ofte iris al la vicluiganto por ĝustigi ĝian iradon, murmurante al si mem: “Kiel severa nia direktoro estas! Se oni malfruiĝas tri minutojn, la salajro estos malpluigita. Se tri fojojn . . .” Mi ĉiam sentis, ke tio kio estas portata en liaj manoj, ne estas horloĝo, sed lia konstante maltrankviliĝanta

koro. Ĉe tio la vicluiganto esprimis sian abomenon per mokantaj vortoj:

“O, tri minutoj antaŭ la sepa — Ve, ĉu mi ne plurfoje konsilis vin aĉeti brakhorloĝon? Por kio tiel ŝpareme? Prave diras la okcidentanoj ke tempo estas mono.” Ekmontrante sian oran brakhorloĝon per svingo de la brako, li diris aldone: “Prenu nian profesion kiel ekzemplon. Se oni volas ‘kapti la ĉapon*’, oni dependas de telefona aparato kaj bona brakhorloĝo. . . .”

Kiam la jaro proksimiĝis al sia fino, la et-oficisto estis ne plu la posedanto de la vekhorloĝo: Li estis devigita forvendi ĝin kune kun aliaj objektoj, kaj ekde tiam li ĉiun nokton ne povis dormi trankvile. Sed la vicluiganto ankaŭ ne povis fieri pri sia ora brakhorloĝo multe pli longe. En marto de la sekvinta jaro, mi ne scias kial, li estis devigita forvendi sian oran brakhorloĝon kaj la lurajton de la domo. Je la tago kiam li transloĝiĝis, li petis mian helpon. Kun profunda suspiro li diris: “Efektive estas unu tempo nun, kaj alia tempo tiam!” Antaŭ ol mi diris ion, li daŭrigis: “La mono de tia ulo kia mi, estas kvazaŭ la akvo sur la dorso de anaso. . . .” Post longa klopodado, la tago mallumiĝis. Senkonscie la vicluiganto levis sian brakon por rigardi, kaj ekstremante diris kun ĝemo: “Ho ve, mi ne scias kioma horo estas nun.”

Oni ankaŭ povas diri ke mi havis horloĝon. — Kiam venis mia vico por nokta patrolado en la fabriko, la fremda direktoro donis al mi strangan horloĝon, kiun mi devis kunporti kiam mi senĉese rondiris al la kvar anguloj ĉirkaŭ la fabriko. Kiam mi atingis unu el la kvar anguloj, mi devis streĉi la horloĝon per la ŝlosilo kiu troviĝis tie. La horloĝo estis tiel stranga ke, kiam

* “Kapti la ĉapon” estas spekulacio dum tre mallonga tempo en borso por ĉasi prez-diferencon de akcioj ktp.

*Ĉio Perfektas!
Gratulon! Gloro!*

*Jen Oriento Dua Numero
Fabele flugas ĉirkaŭ la tero.
Mita evento de l' hom-gento!
Marŝ' por konkero de l' kosm-mistero!*

*Titov babilas, manĝas senĝene,
Dormas, direktas, ridas serene!
Tuta jubilas jen U S S R!
Ĉio perfektas! Gratulon! Gloro!*

*Gloro, fiero Sovetunia!
Ora espero internacia!
Vero, libero, riĉo, feliĉo. . . .
Floras patrio proletaria!!*

Laŭlum, 10, aŭg. 1961

la portanto ĉesis iri, ankaŭ ĝi ĉesis funkcii. Se li ripozetis aŭ dormetis pro laciĝo, la superulo tuj sciis tion la sekvintan tagon. La rezulto estis, aŭ li estis riproĉita aŭ punita per malpliigo de laborpago. Ni ĉiuj sciis tiam ke estis la horloĝo kiu kaŭzis tion, sed ni ne povis kompreni ĝian sekreton. Nur post la Liberiĝo kiam la fremda direktoro estis forpelita kaj ni rigardis la internon de la horloĝo, ni komprenis la kialon. La sekreto estis ke, kiam ni streĉis la horloĝon per la ŝlosilo, ĝi markis signon sur la papero en la horloĝo. Kiam kvar signoj estis faritaj sur la papero, tio montris ke ni jam faris unu rondiron. Se ni dormetis, la horloĝo ĉesis iri, kaj la signoj mal-multiĝis. La sekvintan tagon ni estis riproĉitaj. — La fremda direktoro tiel regis nin per la stranga horloĝo, nome per maŝino. Ni fariĝis sklavoj de la maŝino. Fakte, en la tago kiam ni laboris en la laborejo, ĉu ni ne estis egale regataj kaj sklavigataj de la maŝinoj? Post la Liberiĝo, la rilato inter ni kaj la maŝinoj fariĝis malsama ol antaŭe: Ni estas la mastroj. Nia koncepto pri tempo ankaŭ fariĝis malsama: Ni estas laboristoj. . . .

Pri tio mi ne bezonas paroli plu. En la komenco vi demandis al mi kio faris min labormodelo kaj pro-

gresinta laboristo jaron post jaro, kaj ebligis al mi plenumi jam nun la produktan taskon de 1962, krom la kulturo de la Komunista Partio kaj la helpo de la amaso. Sed ĝis la fino mi ankoraŭ ne povas bone klarigi tion. Mi nur povas rakonti al vi tiujn historiojn pri horloĝoj. . . .


“Versajne por vi, kiu iras antaŭ la tempo, estas bezonata alispeca tute nova horloĝo por kalkuli la tempon,” mi intermetis. “Kian horloĝon vi nun havas?”

“En mia hejmo estas elektra horloĝo fabrikita de ni mem en Ĉinio. Sur mia brako estas brakhorloĝo kun la fabrikmarko *Ŝanhajo*.” Li ekridetis, kaj ridetante li daŭrigis: “La horloĝoj, kiujn mi uzas, estas ĝuste de la samaj specoj kiujn ĉiuj aliaj uzas. Se oni volas iri antaŭ la tempo, ili ankoraŭ devas komenci per ĉiu minuto kaj ĉiu sekundo de la nuna tempo.”

Li aŭskultis al sia brakhorloĝo, kvazaŭ li aŭskultus al la pulsado de la produkta impeto. Mi sciis ke li baldaŭ iros por sia laborvico. De malproksime aŭdiĝis laŭta kaj impona sonorado de la doganeja horloĝego kiu estis riparita kvazaŭ tute nova lastatempe.

Muso kaj Kato

Fablo el *Caŭ-gubernio, Ŝandong-provinco*, kolektita kaj reverkita de *Hoŭ Detian*



Celebrado de Sia Liberiĝo per Kantoj kaj Dancoj Ĉen Moŭ

Riĉrikolta Himno
Tondre Sonoras tra la
Val' de Lancang-rivero

—Tibeta Popolkanto—

Kiel eblus la kresko grenplanta,
se ne estus la suno brilanta?
Kiel eblus ĉe l' servutuloj riĉrikolta kanto,
se ne estus la Komparti-gvidanto?

Surĉiele la suno floras,
sur la tero grenplantoj oras,
tra la val' de Lancang-rivero
riĉrikolta himno sonoras.



FOJE muso, ŝtelmanĝante grenon de homo, estis trovita. Ĝi ekmalfermis sian buŝon pro surprizo kaj tuj returnen kuris, kio fortimigis apudan kuniklon.

Reveninte hejmen la muso ĉie fanfaronis: “Eĉ kuniklo min timas! Mi povas esti rigardata la reĝo de la bestoj.”

Iun tagon, kiam la muso promenis en la korto, alvenis kato. Kokido tuj avertis la muson: “Franjo Muso, forkuru tuj, kato alvenis!” La muso diris fiere: “Mi estas la reĝo de la bestoj. Ĉiu ajn min timas, se mi ekmalfermas la buŝon.” Kaj kun malfermita buŝo, ĝi sinjore marŝis al la kato, kaj tiu ĉi lasta ankaŭ sencere monie formangis la muson mem alsendintan.



Artaj ekspozicioj en Pekino

Antaŭ nelonge en Pekino okazis samtempe ok malsamaj artaj ekspozicioj. En la Ekspozicio de fotografajoj de la Popola Liberiga Armeo ekspoziciĝis pli ol 250 verkoj pri la vivo de armeanoj; en la Ekspozicio de Praktikaj Artoj troviĝis verkoj de studentoj de la Centra Kolegio de Industriaj Artoj, ekz-e arkitekturaj ornamoj, desegnoj por kotonteksaĵoj, vest-modeloj, projektoj de libro-bindado, reklamoj, ludiloj ktp.; en la Ekspozicio de Metiartaĵoj de Fugian-provinco, ekspoziciĝis porcelanaj skulptataĵoj, diversaj modeloj faritaj el koloraj paperoj, bambuaj objektoj, lak-objektoj ktp. entute pli ol 300 pecoj de fugian-aj produktaĵoj; pli ol 2,600 fotografajoj de ĉ. 700 personoj el 32 landoj estis ekspozitaj en la Internacia Ekspozicio de Ĵurnalistaj Fotografajoj. Krome estis ankoraŭ aliaj 4 ekspozicioj pri ĉina skrib-arto, sigelil-gravurado kaj pentr-arto.

Urbo antaŭ 3,500 jaroj

En Ĝengĝoŭ, Henan-provinco, oni trovis urboruinion de Ŝang-dinastio de antaŭ pli ol 3,500 jaroj. En la ruino troviĝas granda nombro da tomboj, dom-fundamentoj, keloj kaj kulturaj postlasitaĵoj. Proksime de la ruino troviĝas ankaŭ du pli malpli grandaj forĝejoj de bronzaĵoj kaj po unu laborejo por farado de ostaj objektoj, argilaĵoj kaj alkoholaĵoj. Krom multe da objektoj, argilaj, bronzaĵoj, ostaj, jadaj, eburaj kaj ŝtonaj oni trovis ankaŭ tri ost-pecojn kun skribogravuraĵoj. Nun ĉirkaŭ la urboruino oni jam plantis florojn kaj arbojn kaj konstruis ĉirkaŭmuron kaj tegmentaĵon por ĝin protekti.

Angulo de Ĉanglu-a Sal-produktejo de Hepej-provinco.

Foto de Hinhua

Kin Mu:

Homo kaj Trezoro

DUM la Kontraŭjapana Rezist-milito, mi havis ŝancon vojaĝi al Gujĝoŭ-provinco en la sudokcidento de Ĉinio. Tiam oni tiel prezentis Gujĝoŭ: "La ĉielo eĉ tri tagojn ne serenas, la tero eĉ tri futojn ne ebenas kaj la monujo eĉ tri monerojn ne entenas." La mizero de la popolo estis malfacile priskribebla. Dum neĝaj tagoj, multaj portis vestojn kies pendantaj ĉifonaĵoj flirtis en la vento. La reakciaj regantoj grandskale rekrutigis perforte maturajn virojn, inter kiuj multaj portis nur maldikan veston, kun nekovrita brusto, kiun ili varmigis alpremante bulon da malpura kotono. Alia terura fenomeno estis la manko de salo al la popolo. En tiama Gujĝoŭ oni manĝis roksalon (ŝajne el Siĉuan) aspektantan kvazaŭ malhele grizaj ŝtonoj, kaj sur la krutaj landvojoj oni povis vidi transportistojn portantajn surdorse korbojn ŝarĝitajn per blokoj de roksalo, ĝibe paŝadi antaŭen elspirante malvarman spiron. Kaj kiam elfalis el la korboj etaj saleroj pro interfrapiĝo de la salblokoj, tuj alkuris infanoj por ilin kolekti, enmeti en siajn buŝojn kaj maĉi kvazaŭ bombonon. En la urboj kaj urbetoj estis specialaj sal-vendejoj, sur kies vendtabloj troviĝis nenio alia ol bloko da roksalo, de kiu oni debatis pecetojn per tranĉilo aŭ martelo por vendi podetale kaj mezuris la pezon per precizaj pesiloj. Oni ofte vidis ke kamparaninoj aĉetas nur pecon kun grandeco de olivo kaj ĝin trempas en la kaldrono dum kuirado de legomoj, kaj ĝin elprenas rapide por ke ĝi ne degelu tro multe. Tiutempe la salo estis tia trezoro por la popolanoj. Tiun mizeran fenomenon kaŭzis la peza subpremado al la popolo fare de la reakciuloj, la altega imposto de salo kaj manko de transportaj rimedoj.

Tiaj fenomenoj de ekstrema manko de salo jam delonge forpasis por ĉiam. Sed lastatempe mi pretervole ĝin rememoris. Kial? Ĉar mi legis el ĵurnaloj pri la surprize riĉa salo-produkto de nia lando.

Estis kompreneble ke homo el marbordo ne povis ne miri tiam, kiam li unuafoje observis en Gujĝoŭ la supre menciitan fenomenon. Sed, poste, kiam li ĉiam plimulte sciigis pri la riĉeco de la sal-produkto de la lando, lia emocio ne nur ne malpliigis kun la forpaso de la tempo, sed fariĝis ĉiam pli profunda.

Mi iam vizitis la salfarejon Sanja de Hajnan-insulo. Antaŭ mi sterniĝis milion-akra arĝenta ebenaĵo, vasta kaj senlima, tute simila



Tri Pentristoj, Tri Stiloj

Pri akvareloj de Gu Juan, Ĝoŭ Lingĝaŭ kaj Vu Biduan

La 80 akvarelaj skizoj de Gu Juan, Ĝoŭ Lingĝaŭ kaj Vu Biduan montritaj en la ekspozicio aranĝita de la Unuiĝo de Ĉinaj Artistoj prezentis tri malsamajn stilojn.

La pentraĵoj de Gu Juan estas akvozaĵaj, kaj la penikotuŝoj estas fortplenaj. Li lerte aplikis al siaj verkoj la tradician arton de ĉina pentraĵo. Liaj pentraĵoj bone prezentas la vidaĵon kaj ankaŭ riĉe sugestias. Ŝparemaj estas la penikotuŝoj, tamen la bildoj vidiĝas tre riĉaj je nuancoj kaj ĉinaj gustoj kaj koloroj.

Ĝoŭ Lingĝaŭ montris sian majstran arton en uzado de koloroj kaj zinkblankaĵo en siaj verkoj, kiuj forte impresas la rigardantojn per siaj freŝaj, densaj kaj akrekontrastaj koloroj kaj gusto de ornameco. Li tre bone sukcesis en harmonia kombinado de la koloroj kaj prezentado de imagobildoj.

La pentraĵoj de Vu Biduan distingiĝas per pli multa apliko de okcidenta arto, esprimivaj penikotuŝoj kaj helaj koloroj. Liaj homfiguroj estas solidaj kaj impresas per gusto de lignogravuraĵo. Kaj liaj pejzaĝoj ĉarmas per sia freŝeco de la prezentitaj sentoj.

Por ke niaj legantoj povu aprezi iliajn pentraĵojn, en tiun ĉi numeron ni enmetis kelkajn reproduktaĵojn el iliaj verkoj.



Ruĝa Arbo

Gu Juan




Longseng

Ĝoŭ Lingĝaŭ

Printempa Pluvo ĉe Ŝaŭŝan





Ligiang-rivero post Pluvo

Ĝoŭ Lingĝo

Ĝoŭ Lingĝaŭ





La Operejo de Ulumuçi

Ĝoŭ Lingĝaŭ

Taj-lago post Pluvo

Vu Biduan





Ĉaka-sallago en Cajdam-
baseno en Kinghaj-provinco.

Foto de Hinhua

al stepo, kie la salo estas ne elĉerpeble riĉa kaj amasiĝis en montetoj. Laŭ la longa marbordo de Ĉinio sintrovas tre multaj similaj salfarejoj. Kaj ne malproksime de Sanja situas alia salfarejo Jinggehaj, kiu estas unu el la plej grandaj salfarejoj de la mondo. Krom la marsalon, Ĉinio havas ankoraŭ multe da artezaj salputoj, el kiuj la plej famaj estas tiuj en Siĉuan, kaj neprezenteble riĉan lagsalon. Lastatempe mi legis el ĵurnalo raporton pri Cajdam-baseno en Kinghaj-provinco, kie en la baseno pli granda ol ordinara provinco laŭ amplekso, troviĝas pli ol cent sallagoj, inkluzive mondfaman Ĉarhan-sallagon. Kaj sole la provizokvanto de Ĉaka-sallago, unu el ne tre grandaj inter ili, jam sufiĉas por pli ol 200-jara konsumado de la tuta nacio. Kaj en tiuj sallagoj ekzistas "salpontoj", sur kiuj povas trapasi ŝarĝaŭtoj, kaj ankaŭ domoj konstruitaj el salo . . . tie la salo estas tiel malkara kiel la ĉie trovebla tero. Oni povas diri ke Cajdam estas mondo de salo. Ĉiujn ĉi tiujn oni esploris kaj komencis ekspluati nur de la lastaj jaroj.

Estas popoldiraĵo: "almozpeti per ora bovlo". Tio estis la vera stato en malnova Ĉinio. Oni staris ĉe trezoro, tamen ne sciis ke la trezoro ekzistas ĝuste sub iliaj piedoj, aŭ oni kvankam sciis, tamen ne povis ĝin elpreni, ĉar al ili la vojon ŝtopis la imperiistoj kaj re-akciuloj.

La ekzemploj estis ĉie renkonteblaj en la malnova tempo, ke oni ne povas citi ilin ĉiujn. Ĉirkaŭ Hajnan-insulo estas ĉie salfarejoj, sed tie en Vuĝi-montaro, la tiamaj li-nacianoj ankaŭ suferis la mankon de salo. . . .

Simila stato ekzistas kompreneble ne sole en Ĉinio. Foje mi aŭdis de rumana amiko ke ĉe ili petrolo estas tiel abunda ke ĝi estas kvazaŭ akvo, kaj ke oni eĉ lavas per ĝi la manojn. Sed antaŭ la liberigo de Rumanio, la kamparanoj estis tiel malriĉaj ke ili eĉ ne povis aĉeti por si skatoleton da alumeto. Kaj hodiaŭ en neliberigitaj landoj de Afriko, sur la fekunda grundo, la indiĝenoj povas manĝi nur unufojon en ĉiu tago. Ĉiujn ĉi tiujn fenomenojn, oni povas priskribi kiel malsatadi kun oraj bovloj en la manoj.

Nun la popoloj jam sin liberigis kaj povas utiligi la riĉaĵojn. La trezoro sub la piedoj estas nun elfosebla. "Batalo estas feliĉo", en tiu frazo la vorto "batalo" signifas, laŭ mia opinio, ne nur tiun kontraŭ la klasa malamiko, sed ankaŭ tiun kontraŭ la naturo. La feliĉon oni povas batalakiri nur per pena kaj diligenta laborado kaj el la ĉielo neniam falis eĉ sola rizgrajno aŭ sola fadeno.

Feliĉa estas nia popolo, kaj ni kredas, se ni nur diligente kaj pene laboros, ni certe povos iom post iom forskui la gigantan ŝarĝon — la malriĉecon, kiun ni heredis de la malnova socio.

"Senpatra" bufino naskis idojn

El la ovoj frajitaj de la bufino akirita de la Ŝanhaja Eksperimenta Biologia Instituto de la Ĉina Scienca Akademio per arta unuseksa reprodukto lasttempe el-koviĝis pli ol 800 larvoj kaj plejparto el ili fariĝis bufetoj. Laŭ s-ro Ĝu Hian, estro de la instituto, la eksperimento pruvas: 1-e, nespermitaj nudaj ovojn eligitaj de ovario apartigita de la korpo ne nur havas plenan kapablon kreski, sed eĉ pli konvenas por esti materialo por fari artan unuseksan reproduktadon; 2-e, el buf-ovoj sangumitaj oni ankaŭ povas akiri "senpatrajn" idojn per pikado; 3-e, idoj akiritaj per arta unuseksa reprodukto posedas ankaŭ kapablon reprodukti.

Tibetaj lamaoj pri religia libereco

Ĉepung-templo estas unu el la plej famaj temploj en Tibeto. Antaŭ nelonge Gĵebakhansu lamao de tiu ĉi templo asertis intervjuate, ke antaŭe la tibetanoj havis nenian liberecon de religia kredo. Iuj deziris esti lamaoj, sed la mastro-sinjoroj kaj la superuloj de la temploj ilin ne permesis; iuj ne volis esti lamaoj, sed la regantoj de la temploj ilin devigis. Estis lamaoj, kiuj estis forpelitaj de la temploj, kiam ili perdis labor-forton. Multaj malriĉaj lamaoj enirinte la templojn devis fari diversajn servojn al la superuloj sed ne havis la rajton legi sutrojn. Alia lamao diris, ke tiam ili estis ja nur sklavoj en lamaa talaro. Nur nun ĉiuj lamaoj havas la rajtojn legi sutrojn, partopreni diversajn religiajn agadojn; nur nun, ĉiuj popolanoj, ĉu religiaj, ĉu senreligiaj, kaj ĉu de tiu aŭ alia religio, estas senescepte protektataj en siaj konvinkoj.

Novaj sportaj rekordoj

Novaj sportaj rekordoj kreigis unu post aliaj en diversaj konkursoj en la lastaj monatoj. Krom la sepfoja rompo de la mondrekordo de Ĉen Ginkaj en la pezlevo, kiel jam informita en nia lasta numero, dek kvar aliaj sportistoj rompis en sep sinsekvaj tagoj dek tri landrekordojn en la pezlevaj konkursoj de la regionoj de Tajjuan, Hefej kaj Ŝanhajo.

En paraŝut-salto la 20-jara sportistino Ĝaŭ Juejing atingis la rezulton de 0.365 m. for de la celcentro en la virina individua 1.500-metra kombinita paraŝut-salto, dum sportistinoj Li Ŝuhua kaj Geng Gujfang atingis en la virina individua 1.000-metra preciza paraŝut-salto la rezultojn de 1.15- kaj 1.207-metroj respektive. Ĉiuj iliaj atingoj rompis mondrekordojn en la koncernaj kampoj.

Alia kampo, kies mondrekordo estis rompita de ĉina junulino, estas sagopafado. Studentino Ĝaŭ Suhia de la Ŝanhaja Fizik-kultura Kolegio rompis en Ŝanhajo la mondrekordon de 261 poentoj en la virina 50-metra solecirkla sagpafado kreitan de sveda sportistino Johanson en 1958 per eminenta atingo de 270 poentoj. Krome ŝi rompis ankaŭ en aliaj ok sagpafadaj konkursoj la landrekordojn de ŝi mem kreitajn kaj konservis aliajn du landrekordojn kaj per tio ŝi monopolis la ĉampionecojn de ĉiuj ĉi tiuj konkursoj.

Eminentaj atingoj aperis ankaŭ en aliaj sportoj. Ekzemple, en la naĝado, en Ŝanhajo sole estis rompita ses landrekordoj, kaj en Pekino kvar landrekordoj de la bicikletokonkurso estis rompita nur en du tagoj.

Laŭ statistiko entute 62 landrekordoj (inkluzive 8 mondrekordojn) estis rompita de ĉinaj sportistoj en la unua duono de la kuranta jaro.



Novaj Arbidoj

Ĝu Ŝi

Vej Vej:

PINETO

EN antikva arbaro senbrue elkreskis pineto. Tiel delikata kaj malalta ĝi estis — jen eĉ la filikoj pli altis ol ĝi. Ĝi rigardadis al la filikoj, rigardis kaj rigardis kaj enpenŝiĝis: “Ho, kiel interese! Kio sin trovas post la filikoj?” Ĉiutage ĝi rigardadis kaj pensadis kaj deziregis tuj kreski altega.

Unu monaton, du monatojn . . . ĝi rigardadis, pensadis kaj kreskadis, kaj fine ĝi fariĝis multe pli alta.

Nun ĝi vidis freŝverdajn artemiziojn kaj poligonatojn. Unuflanke de ĝi floris kelkaj florkapetoj de leondontoj, aliflanke etendiĝis arego da fungoj, kaj kiam ĝi jetis rigardon malproksimen, ho, pretervole ĝi ekŝvingetis sin pro ekscitiĝo: Kiel belaj estas la aroj kaj aroj da buntaj sovaĝaj floroj ĉarmokonkurantaj! Ĉie ĉirkaŭe estas arboj, kaj altaj kaj dikaj. Super la arboj estas la blua ĉielo, sed nun videblas por ĝi nur peceto de la ĉarma bluaĵo.

Kvankam la pineto tre ĝojis tion vidinte, tamen ĝi ne kontentiĝis. Ĝi meditadis kiel antaŭe: “Kio ankoraŭ sin trovas post la arboj?” Ĝi rigardadis, pensadis kaj sopiris kreski pli kaj pli alta!

Unu jaron, du jarojn . . . ju pli alten ĝi kreskis, des pli alta kaj vasta ĝi trovis la ĉielon.

Tion rimarkinte la pineto kreskis des pli rapide.

Nun ĝi vidis, ke post la arbaro ankoraŭ estas arbaroj; pli malproksime de ili ankoraŭ estas arbaroj; ankoraŭ pli malproksime, ankoraŭ arbaroj, arbaroj, arbaroj, arbaroj. . . . Kio do ankoraŭ estas post la arbaroj? . . .

Tiel pensante la pineto kreskadis senĉese.

Nun, ĝi jam fariĝis la plej alta arbego en la antikva arbaro, tamen ĝi ankoraŭ deziras kreski pli kaj pli alten, ĉiam senĉese. Ĝi scias, ke ĝi povos vidi pli malproksime, nur se pli alta ĝi fariĝos.

Travivaĵoj de Du Filmaktorinoj

EN la Tutlanda Kongreso de Literaturaj kaj Artaj Laborantoj mi aŭdis la rakontadon de 52-jara filmaktorino Fan Hjupepeng pri siaj personaj travivaĵoj.

Fan Hjupepeng estas aktorino el la frua tempo de ĉina filmo, ŝi sinokupis pri filmlaboro en Ŝanhajo jam en sia 17-jara aĝo. Tiam en Ŝanhajo "bravulaj filmoj" plej populariĝis, sed mankis "trukaj" kaj sekurigaj ekipaĵoj. Foje laŭ la ordono de la reĝisoro ŝi malsupren saltis de sur domo, kaj vundis sian spinon. La vundo estis tre grava. Laŭ la kuracisto la resaniĝo bezonis almenaŭ tri monatojn. Sed intencante rapide finfari la filmon por gajni profiton, nur post kelkaj tagoj la mastro jam devigis ŝin veturi al Suĝoŭ por surfilmigi eksterajn scenojn. Dum la filmado ŝi rajdis sur ĉevalo kaj ŝia talio tiel doloris, ke ŝi daŭre larmis. Fan Hjupepeng diris: "Por ne perdi la vivpanon kaj vivteni miajn patrinojn kaj infanojn, mi timzorgeme klopodegis per mia tuta vivo, tamen tute vanis mia komplezado al la mastro. Kiam mia aĝo ĵus superis 30 jarojn, la mastro jam malkontentis pri mia maljuneco, kaj elpelis min el la filma kompanio."

Fan Hjupepeng estis senlabora por preskaŭ dek jaroj, kaj kiam Ŝanhajo estis liberigita, ŝi jam estis pli ol 40-jara. En la jaro 1952, la Ŝanhaja Filmo-produktejo invitis ŝin reveni al la posteno de filma laboro. Dum la lastaj jaroj ŝi ludis rolojn en pluraj filmoj, kiaj *Kun Tintado en Montaro Venas Ĉevalkaravano*, *Nie Er* kaj aliaj. Precipe en la filmo *Purpuraj kaj Ruĝaj*, en *Ĉio Estas Printempo*, en kiu ŝi ludis la rolon de la patrino, per sia viveca kaj subtila prezentado ŝi gajnis aplaŭdon de la rigardantaro. En la pasinta jaro ŝi estis elektita kiel pionira laboranto de la kulturaj kaj edukaj rondoj de Ŝanhajo. Kun larmoj en la okuloj Fan Hjupepeng diris: "Laŭ la negoca vidpunkto de la kapitalistoj, 30-jara jam estas 'maljuna', kaj kiel oni povus imagi pri filmludo denove en la aĝo de pli ol 50 jaroj! Estas la Ĉina Komunista Partio, kiu donis al mi novan vivon de arto."

Post la kunveno la reprezentantoj de filmaj rondoj ekparolis pri Jang Najmej, alia fruperioda filmaktorino de Ĉinio dum la dudekaj jaroj kiel Fan Hjupepeng. Jang mortis antaŭ nelonge en Tajvan pro malsano, kaj antaŭ sia morto ŝi diris, ke travivinte ĉiajn malfacilaĵojn kaj danĝerojn de la homa vivo, ŝi ne volas ke oni informiĝu pri ŝia morto, sed nur ke ŝi forlasu tiun ĉi mondon en silento. Laŭ informo de hongkongaj ĵurnaloj, antaŭ kelka tempo sur strato de Hongkong oni trovis almozulinon sveninta pro malsato, kaj kiam ŝi estis savita de pasantoj, ŝi neniel volis malkaŝi sian nomon. Poste iu ĵurnalisto rekonis en ŝi filman "stelon" Jang Najmej, kiu iam furoris super la fama filmaktorino Hu Die en la fruaj jaroj.

Kiel malsamajn du specojn de vivo kaj kiel malsamajn sortojn la du socioj destinis al Fan Hjupepeng kaj Jang Najmej, ambaŭ aktorinoj forĵetitaj de la kapitalistoj!



Fan Hjupepeng

Nova eldono de la 24 Historioj laŭdinastiaj de Ĉinio en preparado

La 24 Historioj Laŭdinastiaj de Ĉinio estas kolekto de famaj historiaj libroj pri la ĉina historio ekde la pratempo ĝis Mingdinastio (1368-1644). Sed ĉar ĉiuj tiuj libroj estas skribitaj en ĉina klasika literatura lingvo, ne interpunkciita, tio kaŭzas ialoke malfacilon en la divido de frazoj kaj en kompreno de la sencoj. Krome en la tekstoj de malsamaj eldonoj troviĝas ankaŭ variaĵoj. Por faciligi studon de la ĉina historio, lasttempe Ĝonghua-librejo preparas ĝian novan eldonon, farante komparadon de la malsamaj tekstoj por korektado, kaj interpunkciadon en kunlaboro de historiostudaj institutoj, altaj lernejoj kaj fakuloj. Efektiviĝis jam nun tia eldono de *Historia Libro de Sima Kian* (historia libro pri la tempo antaŭ 87 a.K.) kaj *Registro pri la Tri Regnoj* (historio pri la periodo 220-280 p.K.). El la ceteraj iuj estas en preparado kaj aliaj estas jam en presado.

“Astero”-



ANTAŭ multaj multaj jaroj, apud la monto Astero vivis oĉjo Vang kun sia familio. La maljunaj geedzoj havis du filinojn. La du belaj junulinoj tute similis unu la alian laŭaspekte, sed la pli aĝa Dalan estis frandema kaj maldiligenta, dum la pli juna Hiaŭlan, simpla kaj diligenta.

Estis la 3-a de la 3-a monato, la tago kiam la astero floras. La asterfloroj, laŭ onidiro, povas feliĉigi la diligentulojn. Por serĉi la plej belan asterfloron oĉjo Vang frue ellitiĝis, transiris multajn montojn kaj valojn kaj surgrimpis la pinton de la monto Astero.

Sur la nebulvualita montpinto kun ĉielskrapantaj antikvaj arboj kaj buntaj floroj, oĉjo Vang vidis alian feliĉan mondon — mondon de feoj. Ĉi tie la juna feo Ma, avo Arbo, panjo Cervo, gefratinoj Leporoj, Simiĉjo kaj Sciurĉjo diligente elkulturis brilegan magian floron — astero. Ĉiu ajn povas tuj disflorigi la magian floron kaj akiri kion ajn li volas per cito de la jena sorĉdiro: “Astero, astero, spitanto de ĉia malica vetero! de diligentulo jen sonas parolo: Disfloru jam tuj via floro.”

La juna feo Ma donis la magian floron al oĉjo Vang kaj petis la manon de unu el liaj filinoj. Li diris, ke tiu junulino, kiu ne timas malfacilojn profunde en la sovaĝaj montoj, akceptu la asteron.

La maldiligenta Dalan timis mizeron en la sovaĝa montaro, tial ŝi ne volis akcepti la asteron. La diligenta Hiaŭlan elkore amis la asteron kaj akceptis la amon de la juna feo Ma. En kvietita nokto kun hela lunlumo, Ma alvenis la bordon, prenis Hiaŭlan al la monto kaj ili geedziĝis laŭ la antikva rito. Post la geedziĝo ili laboris diligente kaj vivis feliĉe.

Dalan ekpentis, ke ŝi ne akceptis la asteron, kaj sentis envion kaj ĵaluzon kontraŭ Hiaŭlan pro ŝia feliĉa vivo.

Iu malica lupu kaŝita en kaverno, aspiradis forrabi la magian floron. Ĝi eldivenis sekretan deziron de Dalan kaj volis utiligi ŝian ĵaluzon por efektiviĝi sian intrigon. Ĝi ŝanĝiĝis en nigran katon, akompanadis Dalan kaj kun ŝajnigita komplezemo ĝi konsiladis al Dalan ke ŝi uzurpu la feliĉon per sia anstataŭo al Hiaŭlan.

Kiam Hiaŭlan vizitis la gepatrojn, Dalan petis de ŝi la portitajn vestojn kaj orelingojn, kaj Hiaŭlan

1. La juna feo Ma donis la magian floron al oĉjo Vang kaj petis la manon de unu el liaj filinoj.
2. Unu jaron post la geedziĝo, la juna feo Ma akompanas Hiaŭlan-on hejmenveni.
3. Hiaŭlan ĝoje vivas denove kun leporaj fratinoj, cervaj knaboj ktp.
4. La juna feo Ma kaj Hiaŭlan ĝoje laboras.



ilin donis al ŝi. Kiam poste Dalan postulis la magian floron sur ŝia kapo kaj Hiaŭlan ne volis laŭplaĉe doni al aliulo la amatan magian floron, la malica lupu puŝis Hiaŭlan en la riveron kaj forrabis la magian floron.

Sed la malica lupu ne sciis la sorĉdiron kaj ne povis uzi la magian floron. Ĝi plue minacis Dalan ke ŝi suriru la monton por trompakiri la sorĉdiron. Vidinte ke la fratino estis puŝita en la riveron Dalan ekkomprenis ke ŝi estas trompita; tamen sub la minaco de la malica lupu, ŝi devis iri kontraŭvole sur la monton ŝajnigante sin Hiaŭlan.

Dalan ne povis elteni la turmenton en la koro kaj finfine malkovris al Ma la intrigon de la malica lupu. Post luktado la juna feo Ma kaj liaj geamikoj sukcesis repreni la magian floron kaj mortigis la malican lupon.

Ma citis la sorĉdiron, kaj revivigis Hiaŭlan. Hiaŭlan revenis sur la monton. Sur la monto la floroj floris pli prospere kaj bele. La magia floro ore disradiis sur la montpinto, prilumante la diligentajn kaj kuraĝajn geedzojn Hiaŭlan kaj la juna feo Ma k. a. Dalan sentis honton ĝui alies laborfrukton kaj petis pardonon de Hiaŭlan.

(Daŭrigo de p. 221)

venis al Hiamen, raportis detale al Ĝeng Ĉenggong pri la suferoj de la tajvana popolo kaj prezentis al li la landkarton de Tajvan. En la nomo de la tajvana popolo li petis Ĝeng Ĉenggong repreni Tajvan. Tio ĝuste kongruis kun la deziro de Ĝeng Ĉenggong. Li tuj kunvokis siajn generalojn al sekreta kunveno kaj ordonis konstruadon de batalŝipoj, por ke ĉio estu preta por militiri.

En la 21-a de aprilo, 1661, Ĝeng Ĉenggong mem komandis kvarcent batalŝipojn kun dudekkvin mil oficiroj kaj soldatoj ekveturi de Ĝinmen al Tajvan, kaj alteriĝis en la haveno Nejheliaŭ de Luermen ĉe Tajnan, kaj sieĝis Cikan, la bazloko de nederlandaj invadistoj. Li proklamis al nederlandaj koloniistoj: "Tajvan estas teritorio de Ĉinio. Nun mi venis por ĝin postuli, do vi devas ĝin redoni." Tiam, responde al li ĉie leviĝis la tajvana popolo, sieĝis kaj atakis la nederlandajn invadintojn.

En la 13a de la dekdua monato de la jaro, laŭ la ĉina luna kalendaro (la 1-a de februaro de 1662, p.K.), post kelkaj fortaj bataloj, la nederlandaj koloniistoj finfine kapitulacis. La ĉefo de la nederlanda invad-armeo Kuji retiriĝis el Tajvan kune kun la restintaj soldatoj, oficistoj kaj komercistoj.

Ĝeng Ĉenggong Vivas Eterne en la Koro la de Ĉina Popolo

Repreninte Tajvan el la manoj de la nederlandaj invadintoj, Ĝeng Ĉenggong establis la reĝimon de gubernioj same kiel en la patrolanda kontinento kaj starigis en Penghu-insularo ŝtatan oficejon nomatan

Paciga Oficejo por administri la regionon de Penghu. Kaŭze de la tridekokjara buĉado kaj rabado fare de la nederlandaj koloniistoj, tiam en Tajvan maldensa estis la loĝantaro kaj malalta la produktado kaj la popolo vivis en ekstrema mizero, sed la vasta fekunda tero ankoraŭ ne estis plene kulturita. Ĝeng Ĉenggong gvidis la popolon en Tajvan ekspluati la landon, kaj en sia armeo li aplikis la sistemon de "terkulturanta garnizono". Li protektis la kulturadon de la popolo, helpis ilin plibonigi la produktan teknikon de agrikulturo, stimulis la loĝantojn transloĝiĝi al nekulturita tero por ĝin kulturi kaj entrepreni fiŝadon kaj produktadon de sukerkano, salo k.t.p. Tiuj faroj rapide plialtigis la produktan nivelon de Tajvan kaj multe plibonigis la vivon de la popolo.

Ĝeng Ĉenggong multe zorgis pri la vivo de gaŭŝan-nacio. Li helpis ĝin disvolvi la produktadon kaj, krom tio, ofte mem rondiris al la loko, kie la gaŭŝanoj loĝis. Ĉie, kie li alvenis, la gaŭŝanoj varme bonvenigis lin, kolektiĝinte ĉe la vojo kun vino kaj manĝaĵoj en la manoj.

En 1662, la granda nacia heroo Ĝeng Ĉenggong mortis pro trolaborado, estante nur trideknaŭ-jara. Tamen, lia merito de reprenado de la perdita teritorio por sia patrolando kaj brava batalspirito kontraŭ fremdaj invadintoj ĉiam instigas la batalantan ĉinan popolon. Nun, okaze de la tricenta datreveno de la reprenado de Tajvan, la ĉina popolo ĉie okazigis memorigajn agadojn por esprimi la respekton al sia nacia heroo kaj esprimi sian neŝanceleblan decidon por defendi la integrecon de la teritorio de sia patrolando.

La Ĉina Infana Teatro

Ĝojaj somerferioj



Gimnastiko



Relernado



Propagando pri Higieno



Refreŝiĝo

PRETERPASANTE la enirejon de la Ĉina Infana Teatro en Pekino, oni ofte estas altirataj de la ĝojplenaj infanoj tie svarmantaj, kiuj vivece interparolas pri la ĵus ĝuitaj spektakloj.

La Ĉina Infana Teatro estas grandatipa teatro, kiu povas prezenti ĉiuspecajn infanajn teatraĵojn. La 1-a de junio en la kuranta jaro estis ĝuste la 5-a datreveno de ĝia fondiĝo. Nun ĝi havas pli ol 40 geaktorojn, orkestron kaj proprajn dramverkistojn. Krom en Pekino, ĝi ofte vojaĝas tra la tuta lando por prezenti programojn ankaŭ en aliaj urboj kaj provincoj.

Inter la rigardantoj de la Teatro sintrovas diverssaĝaj infanoj: liceanoj, 11-12-jaraj jun-pioniroj kaj infanoj el la infanĝardenoj. La teatro preparis apartajn programojn por la diverssaĝaj infanoj konforme al la disvolviĝo de iliaj korpoj kaj mensoj. Ekz. teatraĵoj kia *La Revolucia Familio* priskribantaj la revolucion vivon de geknaboj estas plej ŝatataj de liceanoj kaj altklasanoj de elementaj lernejoj, dum la plijunajn infanojn interesas teatraĵoj kia *Kiel la Malgranda Muŝo Fariĝis Elefanto?*, kiu rakontas al ili kiel fariĝi bona infano; kaj infanoj de infanĝardenoj plej volonte rigardas fabelteatraĵojn, kiaj *La Astero** (*Aster Trinervius*), *La Griza Lupego* ktp., ili ŝatas distingi la bonulojn de la malbonuloj en la teatraĵoj por esprimi siajn amon kaj malamon. La multnombraj dramoj kun enhavoj pri la aktuala infana vivo prezentitaj de la teatro donis al la infanoj diversflankan edukon kaj montris al ili kiel lerni kaj vivi, kaj progresi kun ĉiu tago.

Por kontentigi la diversajn dezirojn de la infanoj la teatro ankaŭ klopodas variigi la formojn de siaj prezentadoj. Infanoj povas ofte ĝui ne nur teatraĵojn verkitaĵojn speciale por ili de ĉinaj verkistoj kiel *Laŭ Ŝe*, *Ĝang Tianji* k.a., sed ankaŭ dramverkojn de la sovetuniaj kaj alilandaj verkistoj. La teatraĵo *Neĝa Reĝino*, adaptita laŭ fabelo de H. Andersen, estas multe ŝatata de la infanoj. Kaj por ke la prezentadoj respondu pli konforme al la apartaj postuloj de la infanoj, krom la formo de parola dramo oni ankaŭ ofte aplikas tiujn de dancado, kantado, muzika akompanado kaj la tradiciaj prezentmanieroj de ĉinaj operoj por variigi la scenejajn figurojn.

Kvankam, la plej oftaj scenajoj estas pri la vivo de 6-7-jaraj ĝis dekkelkjaraj infanoj, tamen la aktoroj ĉiuj estas plenaĝuloj. La meznombra aĝo de ili estas ĉirkaŭ 25 jaroj kaj la plej aĝa el ili havas pli ol 40 jarojn. Krom la regula lernado pri politiko kaj teorio kaj la fundamenta ekzercado de la teatra arto, la geaktoroj ankaŭ ofte kontaktiĝas kun lernejoj, infanĝardenoj ktp. diversmaniere por amikiĝi kun la infanoj kaj pli bone kompreni la vivmanieron de infanoj, kaj krei plej vivecajn figurojn sur la scenejo. Kaj por bone ludi rolon en teatraĵo pri besta vivo, aktoroj ofte vizitas zoologian ĝardenon kaj observadas la bestojn tuttage kaj tutnokte starante ĉe la ferkaĝoj por ĉerpi materialojn por la arta kreado.

Infanoj ne nur ŝatas spekti la prezentadojn de la Infana Teatro, iuj el ili ankaŭ ofte korespondas kun ĝiaj aktoroj. Kaj ankoraŭ iuj infanoj ofte vizitas la teatron por pasigi libertempon kune kun la aktoroj. Kaj la lernejoj kaj la gepatroj de la infanoj rigardas la teatron kiel sian helpanton en la edukado de infanoj. Kaj la teatraĵoj de ĝi prezentataj ofte liveras bonan temon por aktivadoj de junaj pioniroj.

Nun, similaj teatroj aŭ teatro-grupoj jam fondiĝis en multaj provincoj kaj urboj tra la tuta lando kaj la infana teatro estas disfloranta en Ĉinio.

Maldekstre de supre:


Sceno el la dramo "Metiista Urbo".

Oni deziras scii ĉu la pafilo de la avo estas vera.

Ankaŭ la malgrandaj aktoroj klopodadas sin klerigi.

Malsupre:

Je la 10a de junio, 1956 pekinanoj venis celebri la fondiĝon de la Ĉina Infana Teatro.





VENTUMILO

Vang Ŝucun:

VENTUMILO estas populare uzata forigilo de varmego kaj polvo, de la ĉina popolo dum someraj tagoj. Kaj krome la belskribajo kaj pentraĵo sur ĝiaj surfacoj, kaj la gravuraĵo sur ĝia skeleto estas ankaŭ speciala formo de belarto propra al Ĉinio.

La formoj kaj materialoj de la ĉinaj ventumiloj estas tre variaj. Laŭforme estas du specoj de ventumiloj, nome: la rondaj kaj la faldeblaj. Laŭ-materiale sin distingas ventumiloj el plumoj, fulardo, tifao, palmfolio, bambuo k. a.




La plej frua aperinto el la ventumiloj estas la pluma. Laŭ antikvaj libroj, jam antaŭ pli ol 3,000 jaroj, en Jin-dinastio (1700-1200 a.K.) ekestis ventumilo el plumoj de fazano. Kaj iom poste, el tiuj de pavo. Tiam ĝi estis tenata de kortegaj paĝioj kiel ŝirmilo por la reĝa moŝto kontraŭ vento kaj suno eksterdome. Kaj tiaj grandaj ventumiloj fariĝis nura ceremonia objekto de imperiestroj post kiam aperis malgrandaj plumventumiloj facile manipuleblaj per mano.


Post la pluma, kreiĝis la fularda ventumilo, kiu populariĝis jam ĉ. la 2-a jarcento a.K. Kaj la faldebla ventumilo kun skeleto el bambuo kaj ventumilfolio el papero aperis en la kvina jarcento p.K.

Laŭ dokumento el la deka jarcento la faldebla ventumilo devenis de Koreio, tial hodiaŭ oni rigardas ĝin ankaŭ kiel simbolon de kultura interfluaĵo inter la ĉina kaj korea popoloj. Sed tia ventumilo populariĝis nur de la dekkvara jarcento.

Surskribo kaj pentrado sur ventumilo, laŭ la verko *Notoj pri Pentraĵoj* (Hua Ŝi) komenciĝis en la tria jarcento, kun temoj ne nur de insektoj, bestoj sed ankaŭ tiuj de portretoj, homoj kaj pejzaĝoj.

Pentro sur faldeblaj ventumiloj komenciĝis nur de Song-dinastio (960-1279 p.K.) kaj vaste populariĝis ekde Juan-dinastio (1260-1368 p.K.). Kaj el la du diritaj dinastioj konserviĝis ĝis nun plej multe da faldeblaj ventumiloj pentritaj de pentro-majstroj.







En 1743, laŭ ordono de la imperiestro de King-dinastio, pentristo Ĝang Ĵoaj ordigis kaj listigis lian kolekton de 300 ventumiloj el la dinastioj Juan kaj Ming (1368-1662 p.K.) plenigantaj du kofrojn en la palaco. La ordigita kolekto estis titolita per *Jan Jun Baŭ Gi* (Trezora Kofro de la Fumo kaj Nuboj). Kaj poste ĝi estis faksimile represita en 1931. La faldebla ventumilo multe pli furoris en King-dinastio (1636-1911 p.K.) kaj tre variaj estis ĝiaj formoj. Valoraj artfruktoj estis elkreskigitaj de multe da famaj mastroj de pentrarto kaj belskribarto en tiu kampo. Sed pri la eminentaj verkoj de popolaj metiartistoj, bedaŭrinde, oni povas trovi nenian priskribon en libroj.

La metiarto de ventumilfarado estas tre populara kaj prospera tra la tuta lando de Ĉinio. En multaj lokoj produktiĝas ventumiloj famaj pro siaj lokaj gustoj. Ekz-e produktiĝas en Guangdong-provinco la ĉaŭgoŭ-a ventumilo kun delikataj bildoj pri historiaj anekdotoj aŭ virinfiguroj sur sia malpeza ventumilfolio; la ventumiloj el Siĉuan-provinco, kun koloraj pentraĵoj pri floroj, birdoj aŭ homfiguroj sur nigra fono. Kaj la ventumiloj de Suĝoŭ distingiĝis per la pentraĵoj pri la famaj dek vidindaĵoj de la Okcidenta Lago. La aŭtoroj de la bildoj sur la fengjun-aj ventumiloj estas kamparanoj de Fengjun-gubernio. Iliaj ĉefaj temoj estas dramscenoj, aŭ floroj kaj birdoj. El la pekinaj bildventumiloj la plej famaj estas tiuj pentritaj de Ding Ziging, pentristo el la lastaj jaroj de King-Dinastio, kun dramscenoj kiel la ĉefa temo. Liaj dramherooj estas ĉiuj belpozaj kaj en plena gusto de la pekina opero. La bildventumiloj de Jangliuking karakteriĝas per sia vaste konata subtileco kaj pompeco, kio pruviĝis en kvindek kelkaj provaj projektoj de pentraĵoj de la erao de Kianlong (1736-1795 p.K.), ĉiuj prezentantaj plej vast-enhavajn scenojn el romanoj aŭ rakontoj.

Krom la supre menciitaj troviĝas ankaŭ alia speco de popolaj ventumiloj, nome ksilografie presitaj. Ili estas parencaj al la pentritaj ventumiloj kaj ĝuas grandan popularecon inter la popolo.

En la farado de la skeleto de faldventumilo, la arto ankaŭ ĉiam progresas. Ĝi tiras al si atenton de artistaj rondoj, precipe kiam bambugravuraj artistoj aplikas sian arton sur la ĉefaj "ostoj" de la ventumiloj.

Aparte menciindaj estas ankaŭ la fame konataj bambuaj ventumiloj plektitaj el delikataj bambulamenetoj de la "Ventumilisto Ĝong" el Zigong, Siĉuan-provinco, kiu utiligante la varian briltonon de la bambulamenetoj, scias majstre plekti belajn desegnojn kaj reprodukti pentraĵojn de famaj pentromajstroj, kaj la santalaj ventumiloj el Suĝoŭ, Giangsu-provinco, kiuj ne nur plaĉas al la okuloj per la delikataj gravuraĵoj sur la ostaro de la ventumilo, sed ankaŭ spiras agrablan bonodoron, kaj estas tre ŝatataj ankaŭ de eksterlandaj geomikoj.





La Sepa Feino Venis al la Homa Mondo

DONG Jong kaj lia patrino vivis kune tre mizere. Li iris ĉiutage sur la monton por kolekti brullignon, kaj lia patrino sin okupadis pri lavado kaj kudrado endome.

Iutage lia patrino malsaniĝis serioze kaj volis manĝi pasteĉon. Dong Jong ne havis monon por aĉeti viandon kaj tre ĉagreniĝis lia koro. Kun hakilo en mano, li iris sur la monton kun premita koro. Subite li vidis blankan leporon dikan kaj grandan. Jen venas viando por pasteĉoj—li kalkulis en sia koro, kaj ĝin postkuris kun la hakilo.

La leporo kuris tre rapide, tamen ĝi estis barita de rivero antaŭ si kaj estis kaptita de Dong Jong. Kiam Dong levis la hakilon por ĝin mortigi, la leporo petis malĝoje: “Frato Dong Jong, mi scias, ke vi estas tre malriĉa. Liberigu min kaj mi vin rekompencos per ĉio kion vi volas!” Dong Jong tre surpriziĝis kaj delasis la leporon, dirante: “Ah, kiel vi povas paroli?” La leporo sin rulis sur la tero, transformiĝis en maljunulon kun blanka barbo kaj diris ridetante: “Mi loĝas ne malproksime de ĉi tie. Se vi iros dek paŝojn antaŭen kaj tri paŝojn retroe de la riverbordo, vi trovos pardonon ruĝe lakitan kaj en ĝi estas mia hejmo. Vi ne havas necesajn bezonaĵojn por vivteni vian patrinon, ĉu ne? Mi havas riz-penikon ĉi tie. Se vi nur recitos la sorĉvortojn: ‘Ho, peniko, miraklon faru, grajno post grajno rizo falu!’ La peniko faligos rizon, kiom vi volas.”

Dong Jong transprenis la penikon kaj trovis ĝin tute ordinara. Kiam li levis siajn okulojn por rigardi la maljunulon post hezito, tiu ĉi jam malaperis. Metinte la penikon en la sinon, Dong Jong rapide hakis du faskojn da brulligno kaj ilin vektportis hejmen.

Li rakontis la okazintaĵojn al sia patrino kaj ŝi tion duon-kredis kun dubo. Ili do ekprovis: Unu tenis rizasakon malfermita kaj la alia laŭte diris: “Ho, peniko, miraklon faru, grajno post grajno rizo falu!” Vere ekfalis rizo! La patrino kaj la filo eklarmis pro ĝojego, kaj resaniĝis ankaŭ la patrino. Deposte, Dong Jong kolektis brullignon sur la monto kiel kutime, tamen li ne plu sin ĝenis pro manko de manĝaĵo kaj vestoj. Kelktempe la patrino disdonis rizon al malriĉuloj kaj ili ĉiuj multe ŝin dankis.

Foje, la patrino diris al Dong Jong: “Filo mia, trinkante akvon, oni ne forgesu la putfosinton. Iru viziti vian leporo-fraton.”

“Bone,” respondis Dong Jong kaj foriris.

Kiam Dong Jong venis al la riverbordo, li iris dek paŝojn antaŭen kaj tri paŝojn retroe, sed li trovis nur du salikojn anstataŭ la pardonon ruĝe lakitan. Li iris plu antaŭen kaj serĉadis ĝis vesperiĝo, sed li ne trovis la pardonon ruĝe lakitan. Li devis reiri. Kiam jam mallumiĝis, Dong Jong revenis al la salikoj kaj pensis: “Do mi portu hejmen iom da brulligno.” Li svingis la hakilon kaj forte hakis. Krakego—jen subite aperis antaŭ liaj okuloj pordo ruĝe lakita! Dong Jong tuj aliris kaj ekfrapis la pardonon. Jen elvenis la maljunulo kun blanka barbo. Kiam li trovis, ke venas Dong Jong, li invitis lin en sian hejmon kun granda ĝojo.

“Por kio vi venas al mi?” demandis al Dong Jong la blankbarbulo. “Por nenio”, respondis Dong Jong. “Vere mirinda estas la riz-peniko, kiun vi donis al mi. Mi venas nur por vin danki”.

“Ĉu vi jam prenis edzinon, Dong Jong?” ree demandis la maljunulo. Dong Jong ruĝiĝis kaj respondis: “Al homo tiel malriĉa kiel mi, kiu knabino ja konsentus edziniĝi?”

“Tamen iu konsentas,” diris la maljunulo ridetante kaj ektiris Dong Jong per sia mano ke li rigardu en la internan ĉambron, kie sidis knabino kun kapo mallevita. Ŝi estis tre bela.

“Nu?” diris la maljunulo.

“Vera belulino!” admiris Dong Jong.

La maljunulo elvokis la knabinon kaj prezentis ŝin al Dong Jong: “Jen estas mia filino. Prenu ŝin



por via edzino!" Dong Jone ne povis teni sian buŝon fermita pro ĝojo. Li kaj la knabino riverencis al la maljunulo kaj hejmen revenis.

Nature la patrino treege ĝojis. Deposte, ĉiutage Dong Jong iris sur la monton por haki brullignon kaj la edzino teksis hejme. Ili vivis tre feliĉe. Tri jaroj forpasis, la edzino naskis unu knabon kaj unu knabinon. Iutage la edzino diris al Dong Jong: "Mia edzo, lasu min sciigi al vi la veron: Mi ne estas homestaĵo sed filino de la diino Vangmu. Mi jam vivis tri jarojn ĉi tie. Tri jaroj sur la tero egalas tri tagojn sur la ĉielo. Se mia patrino eksciis, ke mi forestis jam tri tagojn, oni sendube venos por min kapti." Dong Jong ekploris dirante: "Edzino mia, kiu tiam zorgos la infanojn postlasitajn? Kiel mi povos vivi sen vi!" Ĝuste en la momento, kiam Dong Jong ploris, ekaŭdiĝis tondrego kaj la junulino jam estis forkaptita al la ĉielo.

"Filo mia, kion utilas la plorado?" diris la patrino. "Iru konsulti vian leporo-fraton!"

Ŝia vorto vekis en Dong Jong novan esperon kaj li iris al la maljunulo. Eksciinte la okazaĵon, la maljunulo tre koleris kaj diris al Dong Jong: "Jen malicaĵo de Vangmu. Ensidu sur mian duonigitan lagenarion, vi tuj atingos la ĉielon post fermo de la okuloj kaj tie vi faru kalkulon kun ŝi!" Dong Jong ensidis en la lagenarion de frato-leporo. Vere, tuj venis al la ĉielpalaco je palpebrumo. Tre luksa estis la ĉiela palaco, sed Dong Jong tute ne havis intereson ĝin ĉirkaŭrigardi. Li rekte iris internen kaj venis al granda halo. Li surpaŝis la peronon kaj puŝmalfermis la pordon. Meze de la halo sidis maljuna virino kun vizaĝo pudrita. Ŝi demandis per laŭta severa voĉo: "Dong Jong, por kio vi venas?" Dong Jong diris: "Por trovi mian edzinon." "Kiu estas via ekzino?" "La filino de diino Vangmu." La maljuna virino ankoraŭ pli koleriĝis kaj diris: "Bone, se vi venas por mia filino, do vi ŝin rekonu! Vi povos ŝin konduki hejmen, se vi nur tion kapablos."

La maljuna virino laŭte vokis, kaj venis elpost la ekranon sep knabinoj. Ili ĉiuj estis same belaj kaj ĉiuj similis al la edzino de Dong Jong. Dong Jong embarasiĝis. Vangmu diris: "Eltrovu! Se vi eraros, vi estos mortbatita." "Mi ne povas diri, kiu estas," diris Dong Jong. "Do, foriru!" diris Vangmu, "kaj revenu neniam. Se vi revenos kaj ne povos rekoni, mi vin mortigos!"

Dong Jong hejmenvenis. Li povis nenion fari krom ĝemado. Lia patrino admonis al li, ke li konsultu frato-leporon ankoraŭfoje, sed li ne volis kaj endor-



Revoko al la ĉiela palaco.

miĝis. Li songis, ke lia edzino ŝvebis malsupren el la ĉielo kaj diris al li: "Edzo mia, en la ĉiela palaco mi ne kuraĝis vin rekoni. Morgaŭ vi venu sur la ĉielon kun niaj infanoj. La patrino ne povos nei plu, se vi faros laŭ mia konsilo. . . ." Kaj ŝi diris al Dong Jong la rimedon kaj reflugis sur la ĉielon. Dong sin ĵetis antaŭen por ŝin reteni kaj falis sur la teron — li trovis, ke li songis.

En la sekvinta tago, Dong Jong reveturis ĉielen sidante en la lagenario de frato-leporo kun siaj du infanoj sur la brakoj. Ĉifoje la diino Vangmu koleris ankoraŭ pli forte. Ŝi kunvokis la generalojn kaj soldatojn de la ĉiela kortego por ĉirkaŭgardi Dong Jong kaj ordonis al ili, ke ili mortigu Dong Jong kaj liajn infanojn kune, se li ankoraŭfoje ne sukcesos rekoni sian edzinon.

Dong Jong trankvile venis antaŭ la sep knabinojn. Ili ĉiuj fikse rigardis lin tamen neniu el ili kuraĝis aŭdigi voĉon. Subite Dong Jong faligis siajn infanojn sur la teron kaj donis al ili po unu frapon. La geknaboj ekploregis. Tiam, la sepa knabino sin deturnis kaj ekploris. Dong Jong ŝin kaptis kun ĝojo, dirante: "Jen ŝi estas, jen ŝi estas." La vizaĝo de Vangmu tuj purpuriĝis pro kolero kaj laŭte kriis: "Kiel senhonta vi estas bubinaĉo". La sepa feino diris plorante: "Mi volas iri kun niaj infanoj." Dong Jong diris al Vangmu: "Vi promesis, ke mi povas konduki ŝin hejmen, se mi ŝin eltrovos." Ne povante fari alion la diino Vangmu devis konsenti kontraŭvole.

La sepa feino kaj Dong Jong revenis al la homa mondo gaje kaj ĝojplene brakportante po unu el siaj infanoj.



Juan Jang

Vang Jikin

Pandoh

Šejrab

Radgor

Fotoj de Hinhua



La sportistinoj trovis rokon alportitan de glaci-fluo en glaci-pendaĵa regiono survoje al Kongur-tiubie.

Hinhua:

Virina Montgrimpa Sporto en Ĉinio

LA montgrimpa sporto en Ĉinio havas historion de nur ses jaroj, kaj tiu de la virinoj havas ankoraŭ malpli longan historion de nur tri jaroj. Tamen, sub gvidado de la Komunista Partio de Ĉinio, ĉinaj montgrimpistoĵoj en tempo de malpli ol du jaroj, de julio, 1959 ĝis junio, 1961, jam dufoje rompĵis la mondrekordon de la alteco de virina montgrimrado.

En junio, 1958, kiam la treĵnan kurson pri montgrimrado aranĝis la Komitato de Fizika Kulturo kaj Sportoj en Hiangŝan, Pekino, troviĝis jam kvin sportistinoj inter la unuaj lernantoj. Unu el ili estis Juan Jang, la estrino de la Ĉina Montgrimpistina Trupo por Kongur-tiubie. En la 10-a de aŭgusto de la sama jaro, kune kun la

Je la 10a de julio, la montgrimpistoĵoj triumfe revenas al Kaŝi en Hingiang-a Aŭtonoma Regiono de Ujgur-nacio.

viraj membroj, ili surgrimpis la ĉef-pinton de la glaciejo "7-1", 5215 metrojn super marnivelo, en Gansu-provinco, kaj per tio ili kreis la unuan rekordon de la ĉina virina montgrimrado.

En la 9-a de septembro, 1958, la ĉinaj montgrimpistoĵoj, invititaj de la sovetuniaj montgrimpistoĵoj, kune kun ili surgrimpis la Montpinton Lenin, 7134 metrojn super marnivelo, sur la Pamira Altebeno en Sovetunio. Tiun grimpadon partoprenis ankaŭ ĉinaj sportistinoj. Kvankam ili ne sukcesis atingi la celon pro malhelpo de neĝstormo sur la vojo proksime al la pinto, tri el ili, nome Juan Jang, Ĝou Jujing kaj Giang Jing grimpis ĝis la alteco de 6800 metroj super marnivelo.

En februaro, 1959, ok montgrimpistoĵoj kune kun la viraj surgrimpis la nordorientan pinton de Njanĉjentankulha-monto, 6177 metrojn super marnivelo, en Tibeto. Kvankam ilia atingo en alteco ne estis la plej alta, sed ĝojinda estis la kresko de la trupo de montgrimpistoĵoj. Ĝin partoprenis ne nur virinoj de han-nacio, sed ankaŭ tibetaj junulinoj, vivantaj ekde sia infaneco sur la altebeno.


En la 7-a de julio, 1959, ĉinaj montgrimpistoĵoj kune kun la viraj unufoje surgrimpis la altecon de pli ol 7000 metroj super marnivelo — la Mustag-monto 7546 metrojn, super marnivelo en Tibeto. Inter la gekonkerintoj troviĝis 8 virinoj. Ili do rompĵis la mondrekordon de alteco de 7456 metroj, faritan de la francaj sportistinoj en 1955. Ili



estis: Vang Jikin, Ŝejrab (tibetanino), Pandoh (tibetanino), Radĝor (tibetanino), Ĉjimed (tibetanino), Congĉeng, Vang Kuejhua kaj Ĝou Jujing. Alia sportistino Juan Jang estis vicestrino de la trupo. Ankaŭ ŝi rompis la mondrekordon per atingo de alteco de 7500 metroj super marnivelo en la montgrimpado. Poste, ĉiuj tiuj naŭ sportistinoj akiris titolon "majstro de sporto", tio estas la unuaj "majstroj de sporto" de ĉinaj montgrimpistinoj.

En majo, 1960, en la tagoj kiam la ĉinaj montgrimpistoj surgrim-
pis la Ĝomo-Langma-montpinton, la montgrimpistinoj kvankam ne
partoprenis la surgrimpadon al la plej alta pinto, multe laboris en la
malantaŭo: iuj aliĝis al la transporta brigado, aliaj longtempe servis
kiel medicinaj laborantoj en la tendaro instalita 6400 metrojn super
marnivelo. Ĉiuj tiuj ĉi aktivecoj en certa grado altigis ilian adaptiĝan
kapablon al la alta monto.

En la 17-a de junio ĉijare, la montgrimpistinoj konkeris plie la
Kongurtiubie-pinton de 7595 metroj super marnivelo sur la Pamira
Altebeno, kreante novan mondrekordon de alteco de virina mont-
grimpado kiel raportita sur p. 204 en la lasta numero de nia gazeto.
Inter ili, Ŝejrab kaj Pandoh surgrimis la pinton, kaj du aliaj, Vang
Jikin kaj Radĝor grimpis ĝis la alteco de 7560 metroj super marnivelo.



"Blankkapa Maljunulo"*

Fablo el Ŝehong-gubernio, Siĉuan-provinco,
kolektita kaj reverkita de Li Ĉanglin

IUN jaron antaŭ longe dum tricent sesdek tagoj eĉ unu guton ne
pluvis. La fajrruĝa suno brulegis tuttage. Ĉiuj arboj, herboj kaj
floroj forvelkis. Ankaŭ la birdoj sentis, ke ili ne povis plu vivi, kaj
ĉiuj kunvenis por diskuti kiel trovi akvon por trinki. Iu birdo diris:
"Akvo ja troviĝas ĉe la marbordo, sed tro malproksime. Kion ni povus
fari?" "Tio estas solvebla," diris blanka gruo. "Ni bekfosu kanalon de
la marbordo kaj la akvo ĉi tien alfluos." Ĉiuj opiniis, ke ĝi estas bona
ideo kaj unuanime konsentis flugi al la marbordo por fosi kanalon. Nur
unu el la birdoj, pro timo de penado, kaŝe kolorigis la plumojn sur sia
kapo per blankaĵo kaj diris al la aliaj: "Mi maljuniĝis! Jam neĝblank-
iĝis la kapo! Kiel mi povus fari tian laboron?" Nenian rimedon trovinte
kontraŭ ĝi, ili devis lasi ĝin postresteti.

La birdoj flugis al la marbordo por bekfosi kanalon. Ili bekis kaj
bekis ĝis la bekoj sangis. Tiel malfacile eltenebla estis la flamanta suno,
ke preskaŭ karbiĝis la plumoj de la birdoj. Kiam ili efektive ne plu
povis elteni, ili flugis al malseketa loko por iom spiri pli facile.
Tiamaniere la bekado daŭris sep tagojn kaj sep noktojn, kaj finfine
fariĝis kanalo sur la marbordo. Marakvo alfluis laŭ la kanalo, kaj kie
ĝi preterfluis, tie reverdiĝis la herboj kaj arboj kaj disfloris la floroj.
Ĉie flugadis kaj kantadis la birdoj kun ĝojo grandega.

Ege ĉagreniĝis nur la birdo kiu blankigis sian kapon. Ĝi ne povis
flugi alte, ne kuraĝis kanti, kaj ĝi kaŝis sian kapon timante ke la aliaj
ĝin ridos. Kaj la blanka koloro sur ĝia kapo ne plu estis forlavebla.
Ĝis nun oni ankoraŭ nomas ĝin "Blankkapa Maljunulo".

* Ĉina populara nomo de sturno.

Nikola Kolarov (Bulgario)


Nokto sur la Monto

La suno por fojo lasta
rigardon ĵetis al la mont'.
Kaŝis ĝin la arbar' vasta,
dronis for post la horizont'.

Luno de la ĉiel' hela
ekbrilis sur la arbarspac'.
Kovris ĝin la nokto stela
sur la balkono kuŝis pac'.

La balkono estas ĉarma
kiam sur ĝi brilas la sun'.
Sur ĝi kuŝas nokto varma
kaj lumigos ĝin, pala lun'.

Kaŝita en la urbeto
dolĉe kantas najtingal'
kaj bruas la rivereto
pace en la profunda val'



* **Ilia Viĉev-Pleven-At.** Linkov 4,
Bulgario, kun ĉl. pri ĉt. pk, fil-
maj jurnaloj, gramofondiskoj.

* **Mud Vlast Nekuda,** Piesok E,
poŝto Podbrezova, Ĉeĥoslovakio,
kun ĉl. pri ĉt. k pm.

* **40 geknaboj(14-19j)** dk. pri ĉt.,
interŝ. pm. alumetikedojn, bk.
ktp. adr: E-rondo, Teknikum
Laczsci 1, ul. Poznanska 6/8,
Varsovio, Pollando.

* **Fernanda,** Dessertenne, Germol-
les-sur-Grosne Par Trameyes (S-
et-L), Francio, dk. kun ĉinaj in-
struistinoj per rusa, germana,
angla, franca, lingvoj aŭ E. pri
muziko, literaturo, sociologio k
interŝ. pm. bk.

* **S. Fredriksen,** lignotransisto,
Vihenej 22-Koge, Danlando, kun
skulpturistoj.



La Granda Muro post neĝo.

Foto de Hinhua



Winifred Sandford:

Mi Vizitis Ĉinion

La aŭtorino estas esperantistino de Aŭstralio. En 1960 ŝi vizitis Ĉinion kaj post reveno al sia hejmlando ŝi faris paroladon al kunveno de anoj de la Brisbana Esperanta Klubo pri sia vojaĝo precipe en Ĉinio. Sube ni presigis la paroladon, kiun ŝi sendis al ni, kun iom da mallongigo.

—La Red.

Estimata Prezidanto kaj Geamikoj:

En la pasinta jaro mi vizitis multajn lokojn, — la urbojn: Manilo, Hongkong, Kantono, Ŝanhajo kaj Pekino kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, ĝis la Granda Muro; kaj mi revenis tra Borneo al Brisbano.

Mi havas anglan amikino kiu estas loĝinta en Ĉinio dum kelkaj jaroj. Ŝi laboras ĉe la gazeto: *China Reconstructs*. Ŝi ofte invitis min viziti al ŝi; do fine, mi akceptis.


Mi eniris Ĉinion tra Hongkong, kiu estas, laŭ mi, tre bela urbo. Bedaŭrinde akvo estas malabunda tie, kaj la varmo en aŭgusto estis ne elportebla.

Mi neniam antaŭe en la vivo spertis senton, tiel feliĉan kaj liberan, kiel la sento, kiam mi eniris Ĉinion. Post tiu tempo la vivo fluis glate kaj facile. La ĉinoj ĉiam afable min helpis. Ili portis mian pakajaron; ili enmetis min en la trajnon por Kantono. Je mia alveno en Kantono, min renkontis sinjorino kiu parolis perfekte la anglan lingvon. Post du-tri-hora interparolo ŝi lokigis min sur la trajnon por Pekino. Bonan amikon mi trovis en ĉiu haltloko.

La stacidomo en Pekino estas nova, pura, kompetenta, bela kaj grandega. Ekstere oni vidas anoncojn sur grandaj afiŝoj, kiuj bonvenigas la vojaĝantojn, dirante: Bonvenon, homoj el aliaj landoj. Amikecon al ĉiu.

Je mia alveno en la urbo estis malvarme kaj tre polve. Je la fino de mia restado la vetero varmiĝis. La polvo malpliĝos jaron post jaro, ĉar oni plantis milionojn da arboj, kiuj, grandiĝinte, detenos la polvon alblovatan el Mongolio.

Mia amikino kaj ŝiaj geamikoj kondukis min al parkoj, muzeoj, teatroj, operejoj. Ili invitis min al ĉefmanĝoj kaj festenoj. Mi ĉeestis kvar kunvenegojn. Mi efektive vidis tri milionojn (eble la aŭtoro ĉi tie intencas diri "tri dekmilojn" aŭ



Somera Palaco de Pekino

Foto de Hinhua

eble "tri centmilojn"? — Red.) da personoj en grandega kunveno kontraŭmilita. La pacdeziro de la ĉina popolo kaj ĝia amikeco kun siaj najbaraj popoloj estas profundaj.

Ankaŭ mi promenis sola horojn post horoj tra la stratoj, la parkoj kaj la butikoj. Mi lernis iri sola en omnibusoj.

Tuj post mia alveno en Pekino, mi skribis leterojn al kelkaj organizaĵoj. Mi postulis intervjuojn kun ties anoj. Mi skribis al: La Federacio de Virinoj, la Komitato por Paco, la Rezentantoj de Junuloj, la Y.M.C.A. kaj la Ligo Esperanta. (t. e. Ĉina Esperanto-Ligo — Red.)

Mi ne povus diri al vi ĉion kio okazis post tio. Oni aranĝis multajn vizitojn kaj ekskursojn. Mi iris al tre ĉarma domo por renkonti du sinjorojn de la Esperanta Ligo.

La malnovaj domoj en Pekino staras malantaŭ altaj muroj. Trapasinte pordegon (kiu estas iam ronda, en perfekta cirklo) oni trovas sin en beleta korto kie kreskas arboj kaj floroj. Ofte tri kvar hejmoj staras ĉirkaŭ la korto. Antaŭ la domoj estas altaj ruĝaj kolonoj. Sur la traboj kiu kuŝas trans la kolonoj, oni pentras bildojn.

Tian domon mi vidis, la tagon kiam mi vizitis la esperantistojn. La du sinjoroj renkontis min ĉe la pordego, kondukis min en la domon, kaj iu junulo servis teon al ni. Ili parolis tre bonan, tre belan Esperanton. Ili diris al mi ke la Klubo ne ofte kunvenas ĉar ĉiu estas tre okupata. Oni eldonas multajn librojn pri nova Ĉinio, gazetojn, librojn por infanoj, tradukojn de malnovaj historioj kaj artikolojn originale verkitajn en Esperanto. Kaj, diris la sinjoroj, "Ni pensas, ke Esperanto havas brilan perspektivon en Ĉinio."

Esperantistoj deĵorantaj en la eldonejoj gajnas multan ekzercon. Ili diris al mi ankaŭ, ke ne estas multaj virinoj en la Ligo. Mi konkludis ke la anoj venas aŭ (aŭ venis antaŭe) plejparte el la profesularo. Estas kompreneble. La plejparto de la ĉinoj povis nek legi nek skribi sian propran lingvon antaŭ la Liberiĝo. Ne eblis por ili, do, lerni fremdan lingvon kaj literojn. Sed, nun junuloj kaj maljunuloj, infanoj kaj plenaĝuloj lernas latinajn literojn. Tion mi vidis en la lernejoj kaj en la fabrikejoj.

Miaj gastigantoj diris kial ili kredas ke Esperanto havas grandan estontecon. "Unue," (mi citas) "la disvastigo de la fonetika alfabeto de la ĉina lingvo multe faciligos la lernadon de Esperanto al ni ĉinoj.

"Due, ju pli la orientanoj uzos Esperanton, des pli da internacieco ĝi posedos, kaj, tiel des pli facile ellernebla ĝi fariĝos al la orientanoj.

"Trie, ju pli riĉa la enhavo de la eldonaĵoj esperantaj, des pli Esperanto allogas al si seriozajn lernantojn kaj entuziasmajn adeptojn. Se ĉiuj popoloj tra la mondo eldonos en Esperanto gazetojn kaj librojn, diskonigante siajn konstruadon, bataladon, vivon kaj kulturon, Esperanto sendube fariĝos la plej lerninda kaj lernenda lingvo en la mondo."

Mi parolis kun gesinjoroj kiuj estas vizitintaj Tibeton kaj aliajn malproksimajn partojn de Ĉinio, kie sklaveco ekzistis ĝis antaŭ nelonge. Mi parolis kun tibetanoj, kun soldatoj, kun kuracistoj, kun instruistoj. Mi ne havas tempon nun paroli pri Ŝanhajo, bela, granda, moderna urbo, kie mi vizitis teksan fabrikan kaj novajn, modernajn urbetojn.

Mi fotografis multe da koloraj bildoj, kaj pasigis multajn feliĉajn vesperojn rigardante iliajn. Mi neniam estis pli feliĉa ol mi estis dum tiuj monatoj en Ĉinio . . . lando kie la popolo ŝajnas esti (ja estas) sekura, ĝojega kaj afabla. Ilia pacdeziro kaj amikeco kun la tuta mondo estas forta kaj profunda.

Oktobro, 1960

* **Rezniĉuk Ivan Georgiejeviĉ**, Torgovaja 80, Ĥarkov-11, USSR. pri vivo de laborulaj moroj, kutimoj, politika vivo kun ĉiuj landoj.

* La nederlanda Bouwcentrum (**Centro por esploro kaj informado pri konstruado kaj loĝado**), Weena 700, Roŝfako 299, Rotterdam 3, Nederlando, uzas Esperanton por korespondo. Ĉiuj esp-istaj arkitektoj, konstruistoj, inĝenieroj volu noti!

* Liguria Esperanto Organizo, via biga 1, Genova, Italio por interesi la publikon en ideo de Esperanto kiel internacia lingvo por turismo, petas turismajn materialojn esperantajn de ĉiuj organizoj.

* E-literaturon ĉiuspecan ĉiutempan interŝ. tutmonde, ankaŭ kontraŭ germana: Willi GIESE, Rupprechtstr. 19, BERLIN-Lichtenberg 4, DDR./Bv. oferti, ĉiam resp!

* **Masao Miyamoto** k s-ro Kacsukiyo Takeiĉi, 15-2 Tanaka-Niŝiharuna-ĉo, Sakyo-ŝi, Kyoto-ŝi, Japanio, kun ĉinaj gejunuloj.

* **Ŝigeko Seike**, Ŝiraidani Joŝida-ĉo, Kitaŭua-gun Ehime-ken, Japanio, k. interŝ. bk.

* **Daŭ Thiên Nhan**, Giáo Vién Trúông Ky Thuat 11, Nga Tú Sö-Hanoi, Vietnamio, kun junaj instruistoj pri sporto, foto, insignoj k popola vivo.

* **Hah De Gun**, Phenjanga Medicina Universitato 1V. 3. Koreio, kun ĉl geamikoj.

* **Ludoviko Beden**, 20 Rue Felix Gastaldi, Monako Ville, Monako.

* **Anoj de E-sekcio de Stalina Medicina Instituto** (ĉe Ĥait Boris, P.O. Kesto 41, Stalino 66, Donbas, USSR) kun ĉl. pri E-literaturo, arto, notoj, muziko, sporto, turismo, filatelio, pk, pi kc.

* **S. K. Ĥvorostin**, USSR. Lenin-grad Centr, ul. Sojuza Svjazi 20 kv. 24. pri rusa historio precipe antaŭ Oktobra Revolucio kun ĉinaj historiistoj lernantaj rusan historion.

Literaturo pri Fantomoj

Esperanta eldono de **Rakontoj pri Fantom-spitantoj**, 98-paĝa libreto de 35 ĉinaj antikvaj rakontoj kun 9 tutaĝaj ilustraĵoj, formato: 12 × 18.7 cm., tradukita de Pandiŝo kaj I. Ko, eldonita de Ĉina Esperanto-Ligo, prezo: 0.33 Rb., 0.36 US\$, 0-2-7 £. 0.75 gld. 5 steloj aŭ 3 Rpk.


Laŭ antikvaj legendoj de Ĉinio homoj fariĝas fantomoj post morto. La fantomoj havas du malsamajn fizionomiojn. Estas ferocaj fantomoj terure timigaj kun bluaj vizaĝoj kaj elstarantaj dentoj, dum aliaj sin ŝajnigas homoj kun afabla mieno, sed intencas sorĉi la homojn. Ĝenerale fantomoj ĉiam alportas malbonon al homoj kaj ĉiuj fantomoj homojn timigas. Kelkaj emas trinki homan sangon aŭ homon manĝi, aliaj deziras ke vivantoj mortu por ilin anstataŭi, kaj tiel plu.

Estas ne mirinde ke en la pasinteco oni kredis pri fantomoj, kiam oni ne povis science kompreni aŭ malmulte komprenis la naturajn kaj sociajn fenomenojn. Sed la popolo ne estis por ĉiam senscia. Poste pli kaj pli malmultiĝis tiuj kiuj kredis pri fantomoj kaj la plejparto de la popolo ne plu kredis la legendojn pri fantomoj. Sed la vorto "fantomo" aŭ "diablo" ankoraŭ postlasiĝas inter la vortoj kutime uzataj de la homoj. En nia ĉiutaga lingvo la koncepto de "fantomo" ne plu reprezentas tiun supernaturan estajon kiu ne ekzistas en reala vivo. Ĝi entenas alian signifon. En la lingvo de la polamaso, "fantomo" kaj "homo" estas du kontraŭstarantaj konceptoj: homo signifas bonon dum fantomo malbonon. Ekzemple, "vivante vidi fantomon" signifas absurdajon, kaj "paroli fantoman lingvon" signifas mensogi. Oni nomas intrigon "fantoma ago" kaj per la vorto "fantome" oni priskribas malhonoran konduton kiu ne povas esti dece malkovrita al la publiko.

Per "fantomoj" aŭ "diabloj" oni ankaŭ aludas al la mortaj malamikoj de la popolo, ekzemple, lokaj tiranoj, murdintoj, agresantoj, subpremantoj kaj ekspluatantoj. Dum la pasinta jarcento kiam la ĉina popolo estis humiligata pro la invado de eksterlanda koloniismo, ili nomas "fremdaj homoj" ĉiujn bonajn eksterlandanojn, dum "fremdaj diabloj" aŭ "diabloj" ĉiujn eksterlandajn agresantojn, koloniistojn kaj iliajn agentojn. Oni povas vidi de tio ke la ĉinoj faras tre klaran distingon inter homoj kaj fantomoj, amikoj kaj malamikoj. La imperiistoj kaj koloniistoj estas la malamikoj de la ĉina popolo, dum la bonaj popoloj de ĉiuj landoj iliaj amikoj.

La amo al la amikoj kaj malamo kontraŭ la malamikoj plene speguliĝis en la riĉa klasika literaturo de la ĉina popolo. Rakontoj priskribantaj fantomojn aŭ la lukton inter homoj kaj fantomoj estis unu el la longdaŭraj heredaĵoj de la ĉina antikva literaturo.

Proksimume de la tria jarcento p.K. ĝis la lasta, sufiĉe granda parto de la ĉinaj antikvaj legendoj, noveloj, poemoj, tanci-baladoj*, dramoj kaj skizoj prenis fantomojn aŭ la lukton inter homoj kaj fantomoj kiel sian temon. Tiuj kolektitaj en tiu ĉi libreto estas nur eta parto aŭ fragmentoj el ili. La kaŭzo, kial tiuj ĉi verkoj povas esti ŝatataj de ĉiuj kaj postlasiĝi ĝis hodiaŭ, kuŝas en tio, ke ili spegulis en certa grado la realecon de la vivo kaj la pensojn kaj sentojn de la polamaso. Oni devas scii, ke en la antikva tempo, sub la regado de tiranoj, feŭdestroj aŭ ekster-



RAKONTOJ PRI
FANTOM-SPITANTOJ

landaj agresantoj, la popolo havis nek la liberecon kontraŭstari nek la liberecon kritiki kontraŭ la sklavigado, subpremado kaj ekspluatado de la reganta klaso. Ni do povas bone kompreni, kial la antikvaj popolanoj de nia lando kaj iuj verkistoj inter ili estis devigataj preni la neekzistantajn fantomojn por forte kontraŭbati siajn malamatajn malamikojn.

El tiuj klasikaj verkoj oni povas vidi ke la lukto inter homoj kaj fantomoj estas tiel komplikita kiel tiu en la reala socio. La fantomoj havas du malsamajn fizionomiojn: unu estas terure timiga dum la alia ŝajnigite milda. Sekve en la lukto kontraŭ

* Tanci-balado estas unu el la formoj de ĉina kant-rakontado kun muzikiloj piba (ĉina kordmuzikilo simila al gitaro) kaj hianzi (trikorda muzikinstrumento).

la fantomoj, la homoj ankaŭ devas alpreni du taktikojn: unuflanke oni devas havi ĉionspitan kuraĝon, kaj ne esti timigitaj de la fantomoj, aliflanke oni devas esti prudentaj kaj spritaj kaj, anstataŭ esti trompitaj de la falsa fenomeno de la fantomoj, oni devas esti lertaj por subigi kaj venki la fantomojn.

El tiuj ĉi verkoj deduktiĝis ankaŭ du malsamaj spertoj en la lukto de homoj kontraŭ fantomoj: unu estas ke oni timas fantomojn, ke oni estas teruritaj de ilia feroca ekstera aspekto, kaj finfine submetiĝas kaj estas formanĝita de ili. Tio estas sperto de malsukceso. La alia estas ke se oni ne timas fantomojn, tiam la fantomoj timas la homojn. Koninte la esencon de fantomoj de ŝajna forteco ekstera, sed efektiva senpoveco interna, oni povas kapti kaj subigi ilin finfine. Tio estas la sperto de sukceso. Tio, kion ni kolektis en tiu ĉi libreto *Rakontoj pri Fantom-spitantoj*, estas la sperto de sukceso, aŭ la sperto kiel homoj batalvenkis fantomojn.

Oni devas noti bone ke ĉiuj ĉi rakontoj pri fantomoj skribas pri la antikva epoko. Kaj la antikva epoko de la antikva Ĉinio jam forpasis, kaj forpasis por ĉiam. En la nova popola Ĉinio, sub hela taglumo, la apero de fantomoj aŭ diabloj estas ne plu permesita. La lukto inter homoj kaj fantomoj jam triumfe finiĝis, post kiam fondiĝis la nova Ĉinio en nia generacio. Kaj tiuj ĉi rakontoj pri fantomoj estas verŝajne nur iaspeca heredaĵo de literaturo por la ĝuado de homoj dum postlaboraj horoj.

Tamen la afero ne estas tia ĉie.

Kvankam la suno jam leviĝis en la oriento, en la okcidenta ĉielo regas ankoraŭ mallumo. Ankoraŭ ne tagiĝis en multaj lokoj sur la terglobo. Laŭ la priskribo en la ĉinaj antikvaj legendoj, kiam la koko krias kaj la ĉielo baldaŭ heliĝos, des pli terure furiozas fantomoj. Ĉu la nuna tempo ne estas ĝuste tia? Frenezaj krioj pri militoj, kruelegaj prirabado kaj ekspluatado, minaco de nuklea milito, agreso kaj interveno kontraŭ la pacama popolo, ĉu ĉio ĉi

ne povas esti priskribata laŭ la kutima esprimo de la ĉina popolo kiel "vivante vidi fantomon"? Troviĝas fantomoj de malnova koloniismo. Troviĝas ankaŭ fantomoj de nova koloniismo. La novaj fantomoj ŝajnas pli mildaj, sed efektive ili estas pli intrigemaj kaj kruelaj. Ĉu tio ne estis ankaŭ ofte menciita en la antikvaj legendoj pri fantomoj?

Sekve ni scias, ke krom la homa mondo sin trovas sur tiu ĉi nia planedo ankoraŭ la fantoma mondo. Kiel la homoj povas supervenki la fantomojn kaj fini la fantoman mondon? Ili devas ne timi la fantomojn, ne esti sorĉitaj de ili. Tiamaniere ili finfine certe povos kapti la fantomojn, venki la fantomojn kaj fini la fantoman mondon.

Kredu aŭ ne laŭ via plaĉo, sed ĝi estas la sperto kiun la ĉina popolo akumulis dum miloj da jaroj. Prezento de tiu ĉi sperto per tiuj ĉi rakontoj, en la internacia lingvo Esperanto, al la bonvolaj homoj de ĉiuj landoj tra la tuta mondo ne povas esti sen-signifa.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUI

Ekspozicio de floroj

La Sud-ĉinia Botanika Ĝardeno en Kantono aranĝis en julio ekspozicion de floroj kun subtropikaj karakteroj. En ĝi estis ekspoziciitaj pli ol 2,000 specioj kaj pli


ol 15,000 individuoj de flor-plantoj. Inter ili troviĝis diversaj ekonomiaj plantoj, raraj fruktarboj produktantaj riĉajn fruktojn eĉ post transplantado, kaj aromaj plantoj kreskantaj speciale en subtropikaj regionoj kiel Guang-

dong-provinco. Krome oni vidis tie ankaŭ plantojn, origine kreskantajn en printempo, aŭtuno aŭ vintro, nun florantajn, fruktiĝantajn kaj prospere kreskantajn dum la varmega somero, post arta scienca traktado.

La tropikaj kaj subtropikaj plantoj en la ekspozicio.

Kuriozaj plantoj.

Fotoj de Hinhua





Sur Nia Librobreto

La Demokratia Respubliko de Vjetnamio—

eldonita de Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, Vjetnamio; tradukita de Nguyen Minh Kinh kaj Nguyen Minh Tung. 184-paĝa kun formato 13 × 19 cm., 11 krompaĝaj kliŝoj kaj 1 detala mapo de Vjetnamio. Prezo ne indikita. Oni povas ĝin mendi ĉe la perantoj de *Vjetnamio Antaŭenmarŝas* aŭ rekte ĉe So Xuata Nhap Khan Sach Bao, 32, Hai Ba Trieu, Hanojo, Vjetnamio.

Por esperantistoj eble Vjetnamio jam ne estas tro fremda pro la diligenteco de niaj vjetnamaj kamaradoj ke ili ofte surprizis esperantistan legantaron per novaj esperantaj eldonaĵoj. Tamen por multaj kredeble mankas ankoraŭ klara bildo pri la tuta Vjetnamio historia kaj panorama. Jen per tiu ĉi libreto niaj vjetnamaj kamaradoj prezentas plene kontentigan respondon.

La libro estas dividita en 8 ĉapitroj. Oni povas ilin resumi kiel jene: la geografio, la historio, la reĝimo, la ekonomio, la vivnivelo, la kulturo, la nuna tasko kaj la klopodoj por mondpaco. Vere oni povas informiĝi el tiu ĉi libreto pri ĉiufanka disvolviĝo de nova Vjetnamio. Ĝi plej bone montras, kiel la heroa vjetnama popolo forskuis la katenojn de imperiisma koloniado, de la mizero kaj de la postigiĝinteco. La kontrasto estas tre okulfrapa, ĉar tio troviĝas ne nur inter la pasinteco kaj la estanteco, sed ankaŭ, kaj eĉ ĉefe, inter la du partoj de Vjetnamio mem. Kvankam la libro ne estas destinata por tiu komparo, la legantoj povas klare senti tian kontraston, ke dum la

norda parto de Vjetnamio fariĝis jam tute sendependa socialisma ŝtato kaj la popolo ĝuas ĉiam pli feliĉan bonstaton kaj kulturen vivon, la suda parto restas kaj ĉiam pli profunde falas en la staton de tipa usona kolonio kaj la popolo estas turmentata de politika teroro, de malsato, kaj de diversaj subpremadoj. Tamen oni ankaŭ povas bone kompreni, el la heroa batalo de vjetnama popolo, ke la stato ne longe daŭros. Ĉar la vjetnama popolo tion ne permesas, kaj la historio ankaŭ pruvas, ke la volo de la popolo decidus ĉion.

Klare komprenebla estas la traduko, preseraroj malmultaj. Ĝi estas rekomendinda al ĉiuj esperantistoj, kiuj volas bone koni Vjetnamion.

Honfan

Niúton J. Monteĵro: **Laŭsis-**
tema Studo de Funkcioj,

32-paĝa matematika broŝuro eldonita en Sao Paulo, Brazilo, 1960. Prezo 0.40 US\$, mendebla ĉe S. Paulo Esperantista Klubo, Caixa Postal 5888, Sao Paulo, Brazilo.

La libro faris determinadon de 6 elementoj de la funkcioj kaj studas 46 funkciajn formulojn. Ĝi certe estas interesa legaĵo por esperantistoj-matematikistoj. Aprobinda estas la intenco de la aŭtoro, ke per tiu ĉi libreto li povas iom plivastigi la matematikan esprimadon en Esperanto. Prave li opinias, ke nur la libroj povas evoluigi la teknikan lingvon. Kaj tia evoluigo ja estas vitala por la evoluo kaj plena sukceso de Esperanto. Tiu ĉi

libreto certe faros valoran kontribuon siafaze kaj utilan inspiron al aliaj esperantistoj-sciencistoj.

Ĝoŝ

Miniaturetoj de Geraldo Mattos, eldonita de Brazila Kooperativo Esperantistoj omaĝe al Zamenhof. Formato: 11×16 cm. 77 p.

*Papero blanka, presu bela.
En formo tanka, altnivela,
brazila bardo brava Mattos
jen lerte versas. Vi ne ŝatos?
Sentemaj estas liaj kantoj
pri montoj, maroj kaj florplantoj,
pri fenomenoj de l' naturo:
pri pluv-murmur', pri ventsusuro.
Li kantas arde pri amflamo,
pri ĉirkaŭpren', pri mol' de mamo*

....

*Se l' koron versoj respiegulas,
mi miras, ke li ekrukulas
post sia simpatia "Nigra
Spartako", kaj amore brulas.*

*"Miniaturetoj" — eburturaj,
ja pure nure por-plezuraj.
Se belas via formo tanka,
enhave tamen sangomanka.*

*Ja Mattos vivas en Brazilo.
Ĉu tie riĉas viv-trankvilo,
samkiel la superabunda
brulige brula suna brilo?
Ja arde luktas la popolo
por pano, paco kun vivvolo.
Ĉu ne strangete, ke rukule
jen Mattos kantas senskrupule?*

*Mi ŝatus legi kun plezuro
de Mattos verkojn en futuro
pli vivajn, sanajn porpopolajn,
ne nur priflorajn, primammolajn.*

V. Kanto

Esperanto Marŝas

Pluraj Fakaj Terminaroj
Preparataj

Laŭ informoj de la Terminologia Centro de I.S.A.E., pluraj fakaj terminaroj estas preparataj por eldonado. Inter ili terminaro pri mikroskopio, kemia vortaro kaj meteorologia terminaro estas tute pretaj por presado. I.S.A.E. intencas ilin eldoni mimeografie laŭ la financa stato. Krome estas ankoraŭ 19 aliaj fakaj terminaroj en preparado de diversaj aŭtoroj.

Esperanto-Muzeo kaj -Biblioteko
en Hungarlando

En hungara urbo Szeged fondiĝis Esperanto-Muzeo kaj -Biblioteko en la kadro de "Somogyi", unu el la plej grandaj bibliotekoj en Hungarlando, en kiu antaŭe jam funkciis Esperanto-sekcio. S-ro Hugo Steiner, la fondinto kaj direktoro de IEMW donacis al ĝi 260 presajojn. Ĝin helpis ankaŭ esperantistoj el multaj aliaj landoj. Por ĝin pli riĉigi la Centra Komitato de Hungarlanda Esperanto-Asocio petas la eksterlandajn Esperanto-klubojn, asociojn kaj unuopajn esperantistojn helpi al la muzeo kaj biblioteko per donaco de diversaj esper-

antaĵoj. Ĉion sendu al Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj -Biblioteko, Somogyi Könyvtár, SZEGED, pf. 441, Hungarlando.

Malgranda Antologio el
Ĉeĥoslovakio

Laŭ informo de Bulteno de Esperantista Klubo en Praha, omaĝe al la 40-jara jubileo de la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato kaj la Klubo eldonos malgrandan antologion de ĉeĥa kaj slovaka poezio kaj prozo. Ĝi aperos verŝajne en oktobro kurentjare kaj estos mendebla ĉe la klubo (adr: Týnská ulice 3, Praha 1, Staré Město, Ĉeĥoslovakio)

Esperanto-interpretistoj en
Barcelona Foiro

Dum la 29-a Internacia Foiro de Barcelono okazinta en lasta junio, du interpretistoj — gvidistoj parolantaj Esperanton estis je la dispono de la eksterlandaj vizitantoj. La Foiro eldonas ĉiujare, propagandcele, afiŝojn en pluraj lingvoj, inter kiuj troviĝas ankaŭ Esperanto. (IGS/494)

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

Filmo pri ĉinaj tradiciaj
luktartoj

Ĉinaj tradiciaj luktartoj, inkluzive la sen- kaj kun-instrumentajn, kies fragmentojn oni eble iam vidis en pekinaj operoj, estas karakterizataj per precizeco, rapideco, lerteco kaj belfigureco. Lasttempe la Ŝanhaja Scienca-Eduka Filmproduktejo faris filmon pri tiuj artoj. En tiu ĉi filmo estas prezentata krom la fundamentaj scioj de ĉina luktarto, ankaŭ la lukt-arta ekzercado de diversaj skoloj kaj stiloj, senkaj kun-instrumentaj. La ekzercado de la tuta familio, inkluzive la filojn kaj la nepojn de la 80-jara fame konata majstro de ĉina luktarto, s-ro Vang Ziping, estas ankaŭ prezentata en tiu ĉi filmo.

Nova fizionomio de miljaraj
kavernoj

La kavernoj de Longmen troviĝas sur la rokkrutaĵoj ambaŭ-

borde de Ji-rivero proksime al Luojang de Henan-provinco. En la sennombraj rokaj kavernoj kaj niĉoj, grandaj kaj malgrandaj, konserviĝas pli ol 97,000 budhismaĵoj kaj 3,680 engravuritaj surskribaĵoj. Ĉiuj ili estas verkoj antaŭ pli ol mil jaroj. Ili havas ne nur tre altan artan valoron, sed estas ankaŭ valoraj objektoj por studo de la vivo, manskriba arto kaj historio de la antikva ĉina popolo. Post la Liberiĝo en 1949, la Centra Popola Registaro tuj komencis la laboron de protektado kaj riparado de tiuj kavernoj. Antaŭ nelonge la Kultura Ministerio sendis unu post aliaj fakulojn pri geologio, rokoj ktp. por surloka esplorado kaj studo, kaj dank' al tio ili eltrovis rimedojn preventi veterdifektiĝon, akvopenetradon kaj fendigiĝon de la rokoj ktp. Kaj la montoj estas jam verde plenkovritaj de arbaroj. Tute novan fizionomion ekhavis la tuta miljara kavernaro.

Fenghian-templo, la plej granda
budua kaverno ĉe Longmen.

Foto de Hinhua



Monata Gazeto pri Popola Ĉinio en 3 Lingvoj

Kredeble la legantoj scipovantaj la japanan, francan aŭ indonezian lingvon kaj interesigantaj pri Ĉinio, certe trovos por si la ĝuste bezonatan gazeton. Ĉar en ĝi regule aperas komentoj pri gravaj internaciaj eventoj, artikoloj pri la politiko, ekonomio kaj kulturo de popola Ĉinio kaj fonomaterialoj pri la historio, geografio, kulturaj heredaĵoj kaj tradicioj de Ĉinio, kaj estas krome specialaj rubrikoj por "Rememoroj pri la revolucio", "Pri ĉina historio", "Kultura vivo", "Popol-rakontoj", "Sporto" kaj "Mozaiko" sub kiu estas aperigitaj novaj popolkantoj, artikoloj aŭ fotoj pri revoluciaj memorobjektoj, popolaj metiartaĵoj ktp. Ĝi enhavas ĉiunumere 4 bildpaĝojn, kaj de tempo al tempo liveras specialajn paĝojn de reproduktitaj ĉinaj pentraĵoj. Filatelistoj ofte ĝuos en ĝi kolore presitajn pm. kaj ŝatan-toj de beletro novelojn kaj aliajn literaturajojn. Unuvorte, ĝi liveradas al la legantoj materialojn por pristudi kaj profunde ekkoni Ĉinion.

A b o n u

**CHINESE
LITERATURE**

Anglalingva monata gazeto, kiu vin helpas koni la literaturon de Ĉinio

ĜI ENHAVAS:

novelojn, poemojn, dramojn, eseojn kaj skizojn de diversnaciaj modernaj verkistoj de Ĉinio;

Juvelojn el la trezorejo de la Ĉina klasika literaturo;

popolrakontojn, popolkantojn kaj fabelojn de diversaj ĉinaj nacioj;

pri-literaturaj eseoj de modernaj literaturaj kritikistoj;

novaĵojn pri la ĉina literaturo.

Bele presitaj faksimilaĵoj de belartaj verkoj en koloroj aldoniĝas al ĉiu numero.

Eldonanto: FREMDLINGVA ELDONEJO, PEKINO, ĈINIO

Administranto: GUOZI-LIBREJO, P. O. KESTO 399, PEKINO, ĈINIO

Se vi volas esti bone informita pri la disvolviĝo en Ĉinio kaj pri ĝiaj opinioj pri mondaj aferoj, bonvole abonu la anglalingvan semajnan gazeton



"PEKING REVIEW"

*aerpoŝte liverata al la abonantoj tra la mondo kiel **SPECIALAN DONACON** ricevos ĉiu abonanto aŭ reabonanto ekzempleron da nove aperinta*

**Stories About Not Being
Afraid of Ghost**

kolekto de ĉinaj antikvaj rakontoj, enpensisgaj alegorioj montrantaj al ni, ke imperiistoj, reakciuloj k.a. — "fantomoj" de la hodiaŭa mondo — estas tute ne timindaj se oni ilin traktas serioze.

Pri abonado bonvolu vin turni al viaj lokaj librejoj aŭ al GUOZI SHUDIAN, P.O. Box 399, Peking, China.



Kinghua-Universitato

1. Studentoj de la masinfabrika fakultato (la 3 dekstre starantaj) interkonsiliĝas kun laboristoj de la Unua Aŭtofabriko por renovigi muldo-metodon.
2. Studentoj el la akvokonserva fakultato eksperimentas pri riverbaro.
3. Gestudentoj el la radio-fakultato en projektado de nova aparato.
4. Pli kaj pli multigas la procento de laborist- kaj kamparan-devenaj gestudentoj en la universitato. La junulino Lu Gingfan en la bildo antaŭe estis laboristino en iu pekina medikament-fabriko, nun ŝi studas en la fakultato de precizaj instrumentoj.
5. Tiu ĉi aŭtomata il-masino estas unu el la riĉaj fruktoj produktitaj dank' al kombino de studado kaj laborado en Kinghua-universitato.

